

v-1867-8

Esperanto

JARLIBRO

1958

DUA
PARTO

UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONZULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

SESLINGVA



FALDIFOLIO



ANGLA
FRANCA
GERMANA
HISPANA
POLA
SVEDA

FOR INTERNACIAJ
NEESPERANTISTAJ KONGRESOJ

Alloga laŭ aspekto - Trufa laŭ enhavo
250 eks. 10.- gid.

MENDU ĈE UEA

EENDRACHTSWEG 7 - ROTTERDAM-C.

Prof. Mieczysław Sygnarski

Lektoro de Esperanto en Jag. Unto.

str. Francesco Nullo 12/8

KRAKÓW - POLLANDO

JARLIBRO

DE LA UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO

1958

DUA PARTO

La enhavo de ĉi tiu Jarlibro ne povas esti represata ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U.E.A.

NUR POR UZO DE MEMBROJ

UNIVERSALA-ESPERANTO-ASOCIO

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando

44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de
Pola Popola Respubliko JOZEF CYRANKIEWICZ



VARSOVIO - POLLANDO

1-8 Aŭgusto 1959

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Por la
ZAMENHOF - JARO

Biografiaj Informoj pri D-ro L. L. Zamenhof

Eldonita de C.E.D.

Sendas la C.O. kontraŭ 1 resp. kup.

Arta Fotokarto de
D-ro L. L. Zamenhof

Aperos en Novembro

Prezo: 0.20 gld.; 0.80 steloj.

Eldonas U. E. A.

Mendu jam nun!

Gratulu por

Kristnasko kaj la Nova Jaro

per

„Malnovaj Holandaj Majstroj“

12 diversaj reproduktaĵoj de famaj pentraĵoj,
delikate presitaj kun esperanta teksto.

Serio de po 6 diversaj duoblaj kartoj kun kovertoj :

3.— gld; 12 steloj

MENDU NUN ĈE U.E.A. !

ANTAŬPAROLO

Kiam atingos vin tiu ĉi eldonajo, la komenciĝo de la Zamenhof-Jaro estos jam tre proksime. Ekzistu neniu esperantisto en la mondo, kiu en la fino de tiu festa jaro devos konfesi al si mem, ke li aŭ ŝi nenion faris por sukcesigi tiun jaron !

Sur la sekvantaj paĝoj vi trovos du Alvokojn :

Unu de la Estraro de U.E.A. por subteno de la Fondaĵo-Zamenhof kaj unu de la Internacia Organiza Komitato por kunlaboro al kiel eble plej digna kaj vasta festado de la Jubilea Jaro. Ni varme rekomendas, vere ĝis la limoj de viaj eblecoj agi laŭ tiuj du Alvokoj. En la fino de la Zamenhof-Jaro, dank'al ĉiu el vi ne ekzistu iu iom klera homo en la mondo, kiu ne estu korekte kaj taŭge informita pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Certe vi tuj rimarkis ke tiu ĉi Jarlibro Dua Parto estas pli ampleksa ol iam antaŭe. Post pluraj jaroj reaperas en la Dua Parto fakterminaro, ĉifoje la Gastronomia Terminaro.

Intertempe, pro la grandega kresko de la aktivecoj de la Asocio, la normala enhavo **sen** terminaro fariĝis eĉ pli ampleksa ol la lama enhavo **kun** terminaro. Nur komparu tiun ĉi eldonajon kun la simila el la jaro 1953, do antaŭ nuraj kvin jaroj (70 paĝoj inkluzive de la Fervoja Terminaro). Se oni komparas ankaŭ la nunan amplekson kaj aspekton de la revuo kun tiu el 1953 kaj konsideras la nur malgrandan diferencon inter la nunaj kaj tiamaj kotizoj, oni povos nur miregi, kiel ĉio ĉi estas ebla. Ĝi estas ebla nur pro la nekomparebla sindonemo kaj oferemo de niaj funkciuloj sur ĉiuj postenoj. Kiam vi legos sur la sekvantaj paĝoj la detalan Estraran Raporton, aprobitan en la Kongreso en Mainz preskaŭ kiel ion memkompreneblan, bonvolu konscii ke ĉiuj ĉi laboroj estas faritaj kaj daŭre farataj ne nur kun senĉesa oferado de energio kaj libera tempo, sed ankaŭ kun ofero de konsiderindaj privataj monrimedoj. Pro tio ĉiu membro sentu sin ŝuldanto. Sed estas eble kompensi la ŝuldon : per energia reago al la menciitaj Alvokoj !

M. H. VERMAAS

REZOLUCIO

- IV. 1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto
- IV. 1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;
- IV. 1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;
- IV. 1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;
- IV. 1.4.4224 Instruacias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kuranton evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

El: Rezolucioj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Montevideo, 1954.

ALVOKO

AL LA ESPERANTISTARO OKAZE DE LA 100-JARA DATREVENO DE LA NASKIGO DE ZAMENHOF

Laŭ la decido de la Komitato, la Estraro de UEA ellaboris la unuan planon pri la festoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskigo de D-ro L. L. Zamenhof en 1959. La plano antaŭvidas multajn aranĝojn tra la mondo dum la tuta jaro kun kulminaj punktoj en decembro 1959. La tuta organiza, dokumenta kaj informa aparato de UEA, de la landaj, fakaj kaj aliaj specialigitaj organizaĵoj estos metita en la servon de tiu grandioza celo. La festado de la 100-jara datreveno de la naskigo de Zamenhof estas imagata kiel impona monda manifestacio de la Esperantismo, kiu devas tiel fortikigi la poziciojn de Esperanto en la publika opinio kaj en la decidaj kulturaj-edukaj medioj, ke tiuj post tio oni povos entrepreni novan kampanjon por la enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn.

Por povi plenumi la planon estas necesaj ne nur bona volo, harmonia kunagado, multe da laboro kaj oferema sindediĉo, sed ankaŭ financaj rimedoj.

Tial la Estraro de UEA, kiu kiel la unua kolektis la komencan sumeton de 43 anglaj pundoj, turnas sin al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj al ĉiuj unuopuloj kun la alvoko malavara kontribui al la Fondaĵo-Zamenhof. La pli bonstataj esperantistoj helpu laŭ siaj eblecoj. Agemaj unuopuloj prezentu la aferon al la kunvenoj de la lokaj grupoj kaj faru kolektojn tie. Oni kolektu ankaŭ ekster esperantistaj medioj, se por tio prezentigas okazo. Ne troviĝu eĉ unu esperantisto en la mondo, kiu ne kontribuos almenaŭ malgrandan sumeton por tiu celo. Oni kolektu ankaŭ en landoj el kiuj oni povas nur malfacile sendi la kolektitajn sumojn al eksterlando.

Ĉiuj kolektitaj sumoj estos utiligitaj ekskluzive por la

realigo de la plano, nome por diversaj aranĝoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

La nomoj de ĉiuj donacintoj, ĉu societoj ĉu unuopuloj, estos daŭre publikigataj en la oficiala organo "Esperanto". La kontrolaj organoj de UEA kontrolos ankaŭ tiu konton.

La kontribuojn oni sendu aŭ al la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA menciante ĉiam la celon: por la Fondaĵo-Zamenhof.

Ĉiu faru sian devon kaj helpu, ke la 100-jara datreveno estu digne festata en la tuta mondo!

Por la Estraro de UEA,
Prof. D-ro G. Canuto,
Prezidanto
Prof. D-ro I. Lapenna,
Generala Sekretario

ĈIU ESPERANTISTO EN LA MONDO

KONTRIBUU AL

FONDAĴO-ZAMENHOF

MINIMUME PER UNU MILONO
DE SIA JARA ENSPEZO

(Kolektita sumo ĝis 1-10-'58: 6223,77 gld.)

ALVOKO

AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

La Internacia Organiza Komitato por la Festoj okaze de la 100-jara datreveno de la Naskiĝo de Zamenhof aprobis dum sia kunsido de la 5-a de aŭgusto la definitivan programon por la aranĝoj en la Zamenhof-Jaro. La programo autaŭvidas diversajn aktivecojn dum la tuta jaro kun la kulminaj punktoj en aŭgusto 1959 dum la U.K. en Varsovio kaj, speciale, la 15-an de decembro 1959. Ĉiuj aranĝoj troviĝas sub la aŭspicioj de speciala Internacia Patrona Komitato, en kiun eniris elstaraj personoj de la scienco, literaturo kaj ĝenerale kultura kaj publika vivo de diversaj landoj.

Por ke la jubilea 1959 jaro estu festata kiel eble plej sukcese ĉie en la mondo kaj por ke tiamaniere estu ne nur esprimita digna omaĝo al la memoro de la aŭtoro de Esperanto, sed ankaŭ utiligata tiu okazo por plua intensa disvastigo de la lingvo, estas necese, ke absolute ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiuj unuopaj esperantistoj kunlaboru en la ĝeneralaj kadroj de la programo kaj kontribuu ĝis maksimumo al la sukceso.

Tial la Internacia Organiza Komitato turnas sin al ĉiuj landaj, fakaj kaj specialaj organizaĵoj, kiel ankaŭ al la lokaj societoj, grupoj kaj kluboj kun la alvoko plenumi tiujn partojn de la programo, kiuj apartenas al ilia kompetenteco.

La Internacia Organiza Komitato insiste admonas, ke absolute ĉiuj publikaj aranĝoj — prelegoj, literaturaj vesperoj, ekspozicioj k.s. — estu ankaŭ laŭ la ekstera formo sur la plej alta nivelo kaj nepre en konvenaj ejoj.

La Internacia Organiza Komitato alvokas ĉiun unuopan esperantiston ne nur helpi al sia loka, landa aŭ faka organizaĵo en ĝia laboro rilate la aranĝojn, sed ankaŭ

mem intensigi sian aktivecon dum la tuta 1959 jaro diskonigante la lingvon inter la gekonatoj, farante prelegojn en la medio de sia laboro aŭ aliloke laŭ la ĉirkonstancoj, instruante la lingvon eĉ nur al malgrandaj grupoj, verkante artikolojn por siaj fakaj revuoj kaj laŭ aliaj manieroj. Plue ĉiu esperantisto kontribuu finance laŭ siaj eblecoj al la Fondaĵo-Zamenhof.

Per la laboro de ĉiuj la Internacia Lingvo faru decidan pluan paŝon antaŭen en la Jubilea Jaro 1959!

La Internacia Organiza Komitato

En Mainz, la 5-an de aŭgusto 1958.



Aperis en aŭgusto

LA LIBRO DE DISCIPLINO

de la Komunumo ĉe Qumran

unua esperanta traduko de manuskripto el la rulaĵoj de la Morta Maro. Publikigita de la usona sekcio de K.E.L.I. Mendu ĉe Donald R. Broadribb, 600 W. 122 St., New York, Usono.

20 paĝoj.

Prezo : 1.- gld. (4 steloj)

U.E.A. KOTIZOJ 1959

Klarigo de la tabelo sur la sekvanta paĝo

MJ (Membro kun Jarlibro) ricevas membrokarton, mem-bromark-folion kaj la jarlibron (Unua Parto en marto; Dua Parto aŭtune).

MA (Membro-Abonanto) ricevas membrokarton, membro-mark-folion, la jarlibron kaj la oficialan gazeton **Esperanto**.

MS (Membro-Subtenanto) ricevas membrokarton, mem-bromark-folion, la jarlibron kaj la oficialan gazeton **Esperanto**. Li afable pagas pli altan kotizon por helpi al U.E.A. finance.

J-MJ kaj J-MA (Junuloj ĝis 21-jaraj) pagas duonon de la kotizoj MJ kaj MA kaj ricevas la samon.

Patr. (Patrono) ricevas membrokarton, membro-mark-folion, la jarlibron, kaj la oficialan gazeton **Esperanto**. Li bonvole pagas la dekoblan MA-kotizon por helpi al pli efika laboro internacia.

Jarl. La cifero en ĉi tiu kolono indikas la prezon de tut-paĝa reklamo en la jarlibro. Duonpaĝa aŭ kvaronpaĝa (pli malgranda ne akceptata) reklamo kostas proporcie. La teksto de la reklamoj kaj la pago devas atingi la Centran Oficejon plej malfrue la 1-an de Novembro por la unua parto, kaj la 15-an de aŭgusto por la dua parto.

Esp. La cifero en ĉi tiu kolono indikas la koston de aparta abono al **Esperanto** (sen membreco) por la tuta jaro.

Ĉiuj kotizoj validas por la kalendara jaro.

Dumviva membreco kostas 20-oble la MA-kotizon.

Oni povas pagi kotizojn al la pagejoj indikitaj, aŭ al la Centra Oficejo :

Universala Esperanto-Asocio,

Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando

pĉk 378964

KOTIZOJ 1959

Lando	MJ	MA	MS	Patr.	Jarl.	Esp.	Valuto
Argentino	75	150	225	1500	760	115	peso
Aŭstralio	12/6	25	37/6	250	120	18/9	ang. ŝil.
Aŭstrujo	45	90	135	900	450	65	sch.
Belgujo	85	170	255	1700	900	125	b.fr.
Brazilo	6.25	12.50	18.75	125	64	9.50	n.gld.
Britujo	12/6	25	37/6	250	120	18/9	ŝil.
Bulgarujo	12.50	25	37.50	250	120	18	levoj
Ĉeĥosl.	30	60	90	600	300	45	k. ĉs
Danlando	12.50	25	37.50	250	120	18	d.kr.
Finnl.	625	1250	1875	12500	6400	950	fmk.
Francujo	750	1500	2250	15000	7750	1150	fr. fr.
Germanujo	7.50	15	22.50	150	75	11.25	g.mk.
Hispanujo	6.25	12.50	18.75	125	64	9.50	gld.
Islando	30	60	90	600	325	50	isl. kr.
Italujo	1125	2250	3375	22500	12000	1700	liroj
Izraelo	6.25	12.50	18.75	125	64	9.50	n. gld.
Japanujo	6.25	12.50	18.75	125	64	9.50	n. gld.
Jugoslav.	500	1000	1500	10000	4800	750	dinaroj
Kanado	1.90	3.75	5.75	37.50	18	2.90	dol.
Kubo	1.90	3.75	5.75	37.50	18	2.90	dol.
Maroko	750	1500	2250	15000	7750	1150	fr. fr.
Nederl.	6.25	12.50	18.75	125	64	9.50	n. gld.

PAGU LA KOTIZON AL

- J. C. Milkuschutz, Sarmiento 3298, Olivos.
 K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, Melbourne.
 Prof. D-ro E. J. Görlich, Währingerstr. 59, Wien IX. Pĉk. 30461.
 R.B.L.E., J. Soyeur, Rue du Chêne 91, Seraing. Pĉk. 1337.67.
 aŭ F. Couwenberg (F.L.E.), Koninginnelaan 14, Blankenberge, Pĉk. 4161.35.
 Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-I, Rio de Janeiro.
 Brita Esperantista-Asocio, 140 Holland Park Ave., London, W. 11.
 Bulgara Esperanto-Asocio, Poŝkesto 66, Sofia.
 J. Šustr. Dlouhá 10, Praha I.
 Seren Andresen, Friggsvej 10 st. tv. Fredericia. Pĉk: 12692.
 Joel Vilkki, Somero, Poŝtgiro 60253.
 U.E.F., 34 Rue de Chabrol, Paris 10. Pĉk. 855-35.
 Fr. Helfers, Postschliessfach 692, (17a) Karlsruhe, Pĉk. 24506.
 Ramon Molera, Calle Hospital 13, Moyá.
 Fed. de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, Reykjavik.
 I.E.F., Corso Galileo Galilei 22, Torino.
 Enlandaj gazetagentoj.
 Japana Esperanto-Instituto, Hongo Motomati 1-13, Tokio.
 S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32-III, Zagreb.
 W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto, Ont.
 Raul Juárez - Sedeño, Apartado 570, Luaces 155, Camagüey.
 René Cagnon, 9 Rue Coli, Rabat.
 J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam-C., Pĉk. 2428-19.

Norvegujo	12.50	25	37.50	250	120	18	n. kr.
N.-Zeland.	12/6	25	37/6	250	120	18/9	ang. ŝil.
Pollando	6.25	12.50	18.75	125	64	9.50	n. gld.
Portug.	50	100	150	1000	480	75	esk.
Sarlando	750	1500	2250	15000	7750	1150	fr. fr.
S.-Afriko	12/6	25	37/6	250	120	18/9	ang. ŝil.
Svedujo	9	18	27	180	90	13.50	sv. kr.
Svislando	7.50	15	22.50	150	75	12	sv. fr.
Urugvajo	7.50	15	22.50	150	75	12	pesoj
Usono	1.90	3.75	5.75	37.50	18	2.90	dol.
Venezuelo	6.25	12.50	18.75	125	64	9.50	bol.
Aliaj land.	6.25	12.50	18.75	125	64	9.50	n. gld.

**PAGANTE
LA
KOTIZON
ALDONU KONTRIBUON
POR LA
ZAMENHOF-FONDAĴO!**

Alfred Skyberg, Østensjøveien 118, Oslo. Pĉk. 13329.
 Cefdelegito de UEA. P.B. Box 5120, Wellington C 1.
 Asocio de Esp. en Pollando, Kozia 3, Varsovio.
 J. Antunes, Rua dos Franqueiros 106, 4, dto., Lisboa.
 Gunter Feis, Hauptstr. 70, Sulzbach-Altenwald. Pĉk. Saarbrücken 22887.
 E. W. Woodruff, c/o Witwatersrand Techn. Coll.,
 P.O. Box 3293, Johannesburg.
 Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken,
 Stockholm C. Pĉk 2012.
 O. Walder, Eigenheim, Romanshorn, Pĉk. VIII, 12139.
 D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida).
 D. E. Parrish, 328 West 46 Str., Los Angeles 37, Cal.
 L. Moulines, Apartado del Este 4845, Caracas.
 aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
 Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando.
 Pĉk. 378964.

**SESLINGVA
FLUGFOLIO**

disdonenda precipe ĉe Internaciaj
 Kongresoj ne - esperantistaj

Petu specimenon - **250 ekz. - 10 gld.**

Mendu ĉe U. E. A.

Eendrachtsweg 7 - Rotterdam

Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto :

Prof. D-ro Giorgio Canuto

Generala Sekretario :

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Komitato :

- Albault, D-ro A., 8, Avenue Et. Billières, **Toulouse**, Francujo. Tel.: GAronne 98-71.
- Albers, B.J.J., Olympiaweg 68-III, **Amsterdam**, Z., Nederlando.
- Allan, J. T., 12 Lonsdale Crescent, **Wellington**, E.3, Nov-Zelando. Tel.: 73-679.
- Auld, Mag. William, Knockfarril, Thornside Road, **Johnstone**, Renfrewshire, Skotlando.
- Avsec, Otmar, Celovská 95/A, **Ljubljana**, Jugoslavio. Tel.: (loĝejo) 31-737, (oficejo) 328-122.
- Azzi, D-ro Ing. Giordano, Viale Giulio Cesare 20, **Como**, Italujo. Tel.: 23459.
- Balech, Prof. E., Casilla Correo 64, **Necochea** (B. Aires), Argentino.
- Baur, D-ro Arthur, Hangweg 57, **Liebefeld-Bern**, Svislando.
- Becker, Gunther, Hauptstrasse 536, **Frankenholz**, Sarlando.
- Borovečki, D-ro Ivo, P.O. Box 1452, **Addis Ababa**, Etiopio.
- Bugge-Paulsen, Kap. Rolf, Dunkersgt. 3-II, **Oslo** N.V., Norvegujo. Tel.: 694526.
- Canuto, Prof. D-ro Giorgio, Via Chiabrera, 37, **Torino**, Italujo.
- Coutinho, D-ro L. de Azeredo, Rua Grão Pará 379, **Belo Horizonte**, M.G., Brazilo.
- Dahl, Einar, Box 900, **Uddevalla**, Svedujo.
- Deubler, K., Agnesstrasse 5/III, (13b) **München**, Germanujo.
- Dolapčiev, Georgi, Bul. Kl. Gotvald 54, **Sofia**, Bulgarujo.
- Domingues, D-ro Carlos, Rua Alvaro Alvim 27, ap. 61, **Rio de Janeiro**, Brazilo. Tel.: 32-9560.
- Doneis, Armin F., Box 105, **Pharr**, Texas, Usono. Tel.: St-7-2390.
- Dragsted, Svend, Vejlemosevej 60, **Holte**, Danlando. Tel.: Holte 1698.

- Epstein, Felix, Haynstrasse 5, (24a) **Hamburg** 20, Germanujo. Tel. 480373.
- Guillaume, Jean, 8 rue Camille Saulnier, **Le Vésinet** (S.&O.) Francujo.
- Herrero, D-ro R., Calvo Sotelo 11, **Valencia**, Hispanujo.
- Herrmann, D-ro W., Bürstädter Str. 3, (16) **Lampertheim**, (Hess.), Germanujo.
- Höfert, Franz, Penzingerstr. 121, **Wien** XIV/89, Aŭstrujo. Tel.: L 11.609 B.
- Holmes, Harry W., O.B.E., 38 Fillebrook Road, **London** E 11, Britujo. Tel.: LEYtonstone 2240.
- Jakob, Hans, Palais Wilson, **Genève**, Svislando.
- Jaumotte, Maurice, 44 de Bruynlaan, **Wilrijk-Antwerpen**, Belgujo.
- Kühlmann, G., Prins Jørgensgade 4 A II, **København N.**, Danlando.
- Lange, O.C., Fiolstraede 9, **København K.**, Danlando. Tel.: (loĝejo) Byen 5214 ydun, (oficejo) Minerva 4180.
- Lapenna, S-ino Emilija, Nova Ves 32, **Zagreb**, Jugoslavio.
- Lapenna, Prof. D-ro Ivo, 77, Grasmere Av., **Wembley**, Mddx., Britujo. Tel.: ARNold 9081.
- Linton, Kenneth G., 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, **Melbourne**, Aŭstralio.
- Llech-Walter, René, 5 Quai Vauban, **Perpignan** (Pyr. Or.), Francujo. Tel.: (loĝejo) 54-38; (oficejo) 38-84.
- Mabesoone, P. M. Pythagorasstraat 122, **Amsterdam** O., Nederlando. Tel.: 51379.
- Maertens, G., Pr. Leopoldstraat 51, **Sint Kruis**, Belgujo.
- Monkiewicz, Boleslaw, Pl. Inwalidów 3 m 56, **Warszawa**, Pollando.
- Murgin, Canko, str. Iskār 46, **Sofia**, Bulgarujo.
- Parker, F., 368 Colne Road, **Burney**, Lancs., Britujo.
- Petit, P., 26 rue Rochebrune, **Rosny-Sous-Bois**, Seine, Francujo.
- Philippe, H., 8 rue Pasteur, **Arras** (P. de C.), Francujo. Tel.: 476.
- Popovic, Prof. B., Zagrebacka 12, **Sarajevo**, Jugoslavio.
- Rajski, Andrzej, Odyncza 3, **Warszawa**, Pollando. Tel. 401-81.
- Reuchlin, Richard, T. 6/18, (17a) **Mannheim**, Germanujo. Tel. 25045.
- Sakowicz, Roman, Skrytka, 26, **Nowa Sól**, Pollando. Tel.: 344.

Sekelj, T., (vojaĝanta) Koresponda adreso: ĉe U.E.A.
Setälä, Vilho, Esperantotie 4, **Matinkylä** (Helsinki), Finn-
lando.

Smith, Norman R., 20 Whalley Avenue, **Davyhulme**, Man-
chester, Britujo.

Söderberg, Karl, Luthagesplanaden 15a, **Uppsala**, Svedujo.
Tel.: 36843.

Step-Bowitz, C., Stensgt. 22b, **Oslo**, Norvegujo. Tel. 695367.

Strönne, Jan, Amiralsgatan 36, **Malmö**, Svedujo. Tel.: 29211.

Thierry, Jean, 26 rue Molière, **Paris** 1, Francujo.

Thollet, Charles, Rue des Ecoles 64, **Kenitra**, Maroko.

Törnskog, Harry, Box 52, **Alvsjö**, Svedujo. Tel.: 473288.

Timponi, D-ro M., Rua Carlos de Vasconcelos 57, **Tijuca**,

Rio de Janeiro, Brazilo.

Yagi, Prof. Hideo, 76 Kawaramachi, **Okayama**, Japanujo.

Observantoj :

Derks, J. J., "Santa Monica", Boulevard d'Italie 6 bis,

Monte Carlo, Monako.

Zeballos Morales, D-ro Roman, **Fray Marcos**, (Florida),

Urugvajo.

LIBRO-SERVO de U.E.A.

Liveras ĉiajn librojn

ĈIAM JE VIA SERVO

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando

HONORA PATRONA KOMITATO

Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro de la
Universitato de Liverpool, Britujo, M.A. de la Universitato
de Londono, Dr. Phil. de la Universitato de Heidelberg,
"Fellow" de la "University-College" en Londono.

Prof. D-ro M. Fréchet, emerita profesoro de la Univer-
sitato de Parizo, membro de la Sciencaj Akademioj de
Francujo, Pollando kaj Nederlando, prezidinto de I.S.A.E.

Prof. D-ro Seiho Nishi, estinta profesoro de la Universi-
tatoj de Sendaj kaj Tokio, nun rektoro de la Universitato
de Gumna, prezidanto de Maebasi Medicina Kolegio,
prezidanto de I.S.A.E.

ESTRARO DE U.E.A.

Prezidanto :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, Via Chiabrera 37, Torino,
Italujo.

Generala Sekretario :

Prof. D-ro Ivo Lapenna, estrarano pri kongresoj, 77 Gras-
mere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Vic-Prezidanto :

H. W. Holmes, O.B.E., 38, Fillebrook Road, London E 11,
Britujo.

Membroj :

R. Liech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj,
viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Direktorino de la Centra Officejo : F-ino M. H. Vermaas.

Konstanta Kongresa Sekretario : G. C. Fighiera.

Redaktoroj de "Esperanto" :

S-ino Kirsten Zacho, H. V. Rasmussen.

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

London, Britujo

Honorofica direktoro :

Univ. Prof. D-ro Ivo Lapenna, jura konsilisto, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Tel. ARNOLD 9081.

Kunlaborantoj en ĉiuj landoj.

Celo :

A. Sciencaj esploroj: Lingvistikaj kaj sociologiaj studoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj multflankaj aplikoj sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. Psikologiaj kaj sociologiaj studoj pri la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Esplorado de la eblecoj por plua utiligo de la Internacia Lingvo precipe sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco.

B. Dokumentado : Enregistrigo de la plej gravaj dokumentoj koncerne la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn. Ellaborado de statistikoj. Kolektado de studoj kaj disertacioj.

C. Informado : Vasta utiligo de dokumentoj menciitaj sub B por verkado de artikoloj; kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj; pretigado de bazaj flugfolioj, alvokoj kaj broŝuroj; aktiva partoprenado en ĉiuj medioj, kiuj pritraktas la problemon de komuna lingvo; interŝanĝado de informoj kaj dokumentoj kun UNESKO, UN kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj : liverado de konvena materialo al la landaj kaj fakaj asocioj.

Raporto pri la agado troviĝas en la Estrara Raporto en tiu ĉi Jarlibro.

SPECIALAJ SERVOJ

DE U. E. A.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Turnu vin al S-ro Daniel Luez, Boul Brossolette, Laon (Aisne) Francujo.

MAGNETOFONA SERVO

Turnu vin al S-ro R. Eichholz, Esperanto-Press, Oakville (Ontario) KANADO.

FILMA SERVO

Turnu vin al S-ro G. C. Fighiera, ĉe la adreso de la Universala Kongreso aŭ ĉe U.E.A.

Aligu viajn amikojn kiel M.A. aŭ M.S.
por ke ili ricevu la

INTERNACIAN REVUON „ESPERANTO” KIAL?

Ĉar ĝi

- ★ pritraktas problemojn de Esperantismo;
- ★ alportas valorajn artikolojn de ĝenerala intereso;
- ★ enhavas literaturajn kontribuojn de elstaraj verkistoj;
- ★ donas informojn el la tuta Esperanto-Movado;
- ★ helpas vin orientiĝi en la Esperanto-literaturo per fidindaj librocenzoj;
- ★ publikigas anoncojn kaj reklamojn el la tuta mondo;
- ★ akurate aperadas ĉiumonate;
- ★ per sia Oficiala Informilo kompletigas la Jarlibron;
- ★ estas la oficiala organo de UEA.

Redaktoroj:

KIRSTEN ZACHO - H. V. RASMUSSEN

Petu specimenan ekzempleron ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

Eendrachsweg 7, ROTTERDAM-C., NEDERLANDO

ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Redaktoroj

WILLIAM AULD

RETO ROSSETTI

320 paĝoj bindita

Prezo : 10.— gld. (40 steloj)

ELDONA FAKO DE U. E. A.

UNIKA VERKO PRI FAMA LITERATURO

Legu la recenzojn en la Esperanto-gazetaro kaj
menuu ĝin ĉe U.E.A.!

Ĉiu abonanto de "Esperanto" dezirus posedi
ankaŭ ĝian kompletigon :

BELARTO

En sama formato, sur sama papero kiel la
revuo "Esperanto", la 72-paĝa BELARTO
plivalorigos vian jarkolekton 1958.

- ★ *LITERATURO*
- ★ *PENTRARTO*
- ★ *MUZIKO*
- ★ *LINGVISTIKO*
- ★ *KULTURAJ ARTIKOLOJ*

Multaj talentaj verkistoj kontribuis por
certigi al ĉiuj legantoj plezurajn horojn.

Al membroj de U.E.A. tiu ĉi valora
kajero kostas nur 2,75 gld. (11 stelojn)

MENDU ĈE U.E.A. !

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN, WIEN I, HOFBURG, AŬSTRUJO



La Muzeo de la tutmonda esperantistaro, fondita 1927 en
Wien per kontrakto kun la Ministerio por Instruado aligita
kiel aparta kolekto al la mondfama Aŭstra Nacia Biblio-
teko por eternaj tempoj, atendas vin ĉiun lundon, merk-
redon kaj vendredon en siaj 5 salonegoj en la iama
imperiestra kastelo Hofburg inter la 9e kaj 15a h. Tele-
fono : R 27944.

La Ronda Salonego prezentas memorlokon por la
pioniroj de la movado, PANTEONON; la plej granda
salono KONSTANTAN EKSPOZICION kun 700 el la plej
valoraj kaj interesaj libroj.

La Ministerio disponigis tiujn ejojn por eternaj tempoj,
bindigas la librojn, pagas la hejtadon, purigadon k.t.p. kaj
nun ĉiujare eĉ donas subvencion.

Membreco : Mecenoj pagas unufoje 60 respondkuponojn;
dumvivaj membroj 25 rpk. kaj subtenantoj po 6 rpk. jare.
Nia "Informilo" 4-foje jare sendota al M. dum 3, al D.
dum 2, al S. dum 1 jaro senpage. Informo kontraŭ rpk.

Invitas Hugo Steiner, fondinto-prezidanto de IEMW.

FINANCOJ

Kompara tabelo pri spezoj 1957. Cio en Ned. Gld.

Enspezoj :

	Rezultoj 1957	Budgeto 1957
Kotizoj AM	4307.71	3500.—
MJ	3301.03	3200.—
MA	51903.26	40000.—
MS	9601.94	10000.—
J-MA	1122.25	
J-MJ	95.—	
Patronoj	565.85	400.—
Abonoj	2087.02	800.—
Donacoj	766.02	400.—
Profito libroservo	4063.13	1500.—
Enspezoj diversaj	913.30	
Rentumo	457.45	
Enspezoj kongresaj :		
sumo	14226.16	
— por propag. konto	<u>8153.33*</u>	
Restas Generala Kaso	6072.83	6800.—
Deficito	760.82	
	<hr style="width: 100%;"/>	<hr style="width: 100%;"/>
	86017.61	66600.—

Elspezoj

Salajroj	14967.11	23000.—
Salajro K.K.S.	7418.99	—
Afranko kaj telefono	3598.50	2600.—
Presajo	2135.35	1000.—
Oficejaj elspezoj	5814.71	2500.—
Luo Adm. oficejo	1601.23	1650.—
Jarlibro	15096.73	8000.—
Gazeto	28297.63	22000.—
Vojagelspezoj estraraj	1058.43	1500.—
aliaj	855.22	500.—
Geneva oficejo	869.—	850.—
Akademio	213.—	220.—
Div. elspezoj	2694.48	900.—
Amortizo	1397.23	1880.—
	<hr style="width: 100%;"/>	<hr style="width: 100%;"/>
	86017.61	66600.—

*) Licencpago	3532.12
Profito Kopenhago (supl)	695.59
Profito Marseille	<u>3925.62</u>
	8153.33



STATO DE LA ELDONA FONDAJO JE 31-12-1957

n.gld.
Saldo 1 januaro 1957 Eldona Fondajo 3884.02

Eldonaĵo "La Internacia Lingvo" en 1957

Vendoj	793.29	
Kostoj	534.98	
		Restas por Eld. Fond. 258.31

Eldonaĵo "Vagado sub Palmoj" en 1957

Vendoj	280.83	
Kostoj	245.90	
		Restas por Eld. Fond. 34.93

Eldonaĵo "Angla Antologio" en 1957

Vendoj	1431.99	
Kostoj	1212.37	
		Restas por Eld. Fond. 219.62

Eldono de Gramofondiskoj en 1957

Vendoj	1272.01	
Kostoj	797.12	
		Restas por Eld. Fond. 474.89

Saldo 31 Decembro 1957
Eldona Fondajo 4871.77

Aktivo

Mono en la banko	739.44	
Mono en la poŝtekkonto Ned.	2293.61	
Mono en la poŝtekkonto Sved.	162.41	
Mono en la Abbey Nat. Building Soc.	435.27	
Mono en la C.O.	<u>613.62</u>	4244.35
Obligacioj		29820.—
Steloj, respondkuponoj ktp.		334.45
Antaŭp. elspezoj		5889.15
Debitoroj		53852.06
Libroj ktp. (stoko)		14110.98
Maŝinoj	370.09	
Meblaroj	9662.70	
amortizo	- 2794.46	7238.33
Garantiaj sumoj		<u>300.—</u>
		115789.32

Pasivo

Kreditoroj-liverantoj	13353.54	
Kreditoroj-bonhavantoj	16020.80	
Kotizoj antaŭpagitaj	20295.58	
Enspezoj antaŭp.	1821.02	
Elspezoj pagotaj	1177.75	
Apogantoj libretoj nericevita	<u>10401.53</u>	63070.22
Garantia Fondajo		5500.—
Eldona Fondajo		4871.77
Fondajo Un. Ekspozicio		44.20
Fondajo Oficeja Ilaro		356.96
Propaganda Konto		3053.27
Fondajo Helpe al Hungarujo		260.—
Fondajo Zamenhof		562.75
Kapitala Konto 1.1.1957	33006.07	
DM kotizoj 1957	<u>5824.90</u>	
	38830.97	
% Deficito spezkonto 1957	<u>760.82</u>	
		38070.15
		115789.32

RAPORTO PRI LA KONTRŬLO DE LA
ADMINISTRADO DE LA CENTRA OFICEJO

Subskribintoj kontrolis la librotenadon pri la jaro 1957 kaj la bilancon je la fino de la jaro de la Centra Oficejo en Rotterdam. Por nia laboro ni ricevis ĉiujn deziratajn informojn de la direktorino de la C.O. kaj de la revizoro, S-ro Isaacs, kiu grandparte faris la administradon kaj faris la bilancon. Pro la amplekso ni ne povis ekzameni ĉiujn kontojn detale, sed ni opinias, ke ĉio estas en bona ordo.

Bedaŭrinde mankas al ni konteltiro de la banko en Londono, en kiu troviĝas la saldo, kaj listo de la obligacioj. Pro tio ni ne povis kontroli tiun eron de la bilanco. Tial ni ne respondecas pri tiu parto de la bilanco. Estas urĝe necese, ke la kuratoroj zorgu, ke ĉiujare estu en la C.O. konteltiro de la banko pri tiuj obligacioj. La sama sugesto jam estis farita en la raporto pri la jaro 1956, sen sukceso.

Volonte ni proponas, ke la Komitato malŝarĝu F-inon M. H. Vermaas pro la bona Administrado de la C.O. kaj danki ŝin pro ĝia gvidado.

ALDONO AL LA RAPORTO; Informoj kaj sugestoj

- 1) Ni sciigas al vi, ke la kontoj de la debitoroj kaj kreditoroj ankoraŭ povas enhavi erarojn aŭ malĝustajn saldojn el la tempo de la angla administrado. Tamen, la C.O. esperas, ke ĉiuj kontoj estos kontrolitaj je la fino de la jaro. Certe tio estas ampleksa kaj temporaba laboro.
- 2) Ni sugestas ke en la enspezoj aperu la tuto de la kotizoj enkasigitaj kaj en la elspezoj la procentaĵoj pagitaj al la ĉefdelegitoj kaj perantoj pri la kotizoj.
- 3) Pri la asekuro : temas nur pri unu monato kaj duono (4.10 gld.). La cetero de la elspezoj por 1958 (28.55 gld.) estas en la kalkulo de antaŭpagitaj elspezoj. Tiu apartigo ne ekzistis en la antaŭaj bilancoj. La tuta asekura elspezo estis envicigita en la "domelspezoj".

B. J. J. Albers

P. Petit

Rotterdam, la 12-an de julio 1958.

GARANTIA FONDAJO DE UEA

(Administranto : E. Malmgren)

Spezoj 1957

Enspezoj :

Rentumo	sv.kr.	690.98	
Rentumo 1.578.85 svis.frcs		1.880.—	
		<u>2.570.98</u>	

Elspezoj :

	sv.kr.		
	frcs		
Reprezentado ĉe Unesko-konferenco en Delhi		1.071.—	
Kontribuo al CED		1.870.—	
Bankelspezoj		67.40	
		<u>3.580.—</u>	
		<u>3.580.—</u>	

Bilanco

31.12.'56 31.12.'57

Aktivoj :

	sv.kr.		
En sveda banko		16.750.89	17.441.87
En svisa banko (6.065.50 resp. 4.635.95)		7.145.—	5.500.—
Obligacioj, nom. 9.000.— kanad. dol. 45.000.—		45.000.—	45.000.—
Bonhavo ĉe Centra Oficejo (5.500.— n.guld.)		7.270.—	7.270.—
		<u>76.165.89</u>	<u>75.211.87</u>

Pasivoj :

Kapitalo	76.165.89	75.211.87
(75.211.87 sv.kr. = proks. 54.500 n.guld.)		

Stockholm, 31 dec. 1957.

Administranto de la Fondajo.
E. Malmgren

Reviziita

Jan Strönné

Harry Törnskog

Komitatanoj.

SERVA CENTRO, GENEVO

Jarkalkulo 1957

Enspezoj :

	Fr.sv.
Rentumo el paperoj kaj banko	345.95
Jara subvencio	1000.00
Saldo el antaŭa jaro (1956)	90.00
Sumo de l'enspezoj 1957	<u>1435.95</u>

Elspezoj :

Lupago, prizorgo	360.00
Oficej-elspezoj	384.60
Afranko	144.05
Materialo	124.15
Biblioteko	75.00
Diversaj elspezoj	184.85
Sumo de l'elspezoj	<u>1272.65</u>
Saldo al nova kalkulo (1958)	163.30
	<u>1435.95</u>

1958. 1 Jan. En konto 163.30

Fondajo Hector Hodler :

	Fr.sv.
Usonaj valorpaperoj - val. 31.12.57	7000.—
En banko	8540.—
Valoro je 31a decembro 1957 :	<u>15540.00</u>

Genève, la 31an de decembro 1957.

Hans Jakob

Honora Administranto de la SC

La Estraro de U.E.A. komisiis la subskribinton kontroli la bilanco kaj kalkulojn por la jaro 1957 de la Serva Centro de U.E.A.

S-ro Petit trarigardis la koncernajn dokumentojn kaj komparis ilin kun la enskriboj en la taglibro. Li konstatis la bonordon de la dokumentoj pri la obligacioj de la Fondajo H. Hodler en Usono, kiuj montrigis taŭge prizorgitaj.

S-ro D-ro Baur devos siaflanke ekzameni la bonordon de la svisaj obligacioj (kaj banklibreto).

Sub tiu ĉi rezervo de la subskribo de D-ro Baur post ekzameno de tiu punkto en Genevo, la subskribinto proponas la akcepton de la bilanco pri 1957 kun esprimo de danko al la Honora Administranto.

Mainz, la 3-an de aŭgusto 1958.

sign. P. Petit.

Eldonaĵoj de U.E.A.

ANGLA ANTOLOGIO

Prezo: 10.- gld. 40 steloj

BELARTO

Prezo por membroj: 2,75 gld. 11 steloj

VAGADO SUB PALMOJ

Prezo: 2,50 gld. 10 steloj

A. SPEZKONTOJ

Elspezoj, esprimitaj per % de la ricevitaj kotizoj

	1956	1957
Salajroj (inkl. K.K.S.)	38,86	30,87
Afranko	5,23	4,93
Presajoj	3,26	2,93
Officejaj elspezoj	7,41	7,97
Luo oficejo	2,37	2,19
Jarlibro	13,49	20,69
Gazeto	39,11	38,77
<hr/>		
Vojaĝelspezoj estraraj	2,90	1,45
Vojaĝelspezoj aliaj	2,99	1,17
Geneva oficejo	1,38	1,19
Akademio	0,34	0,29
Diversaj elspezoj	3,87	3,69
Amortizo	2,23	1,91
<hr/>		
Sumo kotizoj en Ned. gld.	62500	72900

B. BUDĜETOJ

Taksitaj elspezoj esprimitaj per % de la taksitaj kotizoj

	1957	1958	1959
Salajroj (inkl. K.K.S.)	39,72	34,22	32,58
Afranko	4,49	5,35	5,30
Presajoj	2,59	2,01	1,99
Officejaj elspezoj	3,45	7,65	6,29
Luo oficejo	2,84	2,57	1,99
Jarlibro	13,81	16,04	19,07
Gazeto	37,99	32,08	37,09
<hr/>			
Vojaĝelspezoj estraraj	2,59	2,67	2,65
Vojaĝelspezoj aliaj	0,86	0,80	0,99
Geneva oficejo	1,47	1,13	1,16
Akademio	0,38	0,28	0,30
T.E.J.O.	—	—	0,66
Diversaj elspezoj	1,55	1,33	1,99
Amortizo	3,24	2,01	2,05
Taksitaj kotizoj en Ned. gld.	57900	74300	75500

LA 41-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
EN KOPENHAGO 1956

Enspezoj :

	d.kr.	d.kr.
Kongresaj kotizoj		64.832.01
Loĝiga servo		6.584.00
Ekskursa servo		3.056.36
Donacoj		279.20
Anoncoj		4.848.00
Foto-servo		653.81
Antaŭkongreso		606.00
Infankongreseto		180.89
Lupago de Libro-Servo		2.243.55
Diversaj enspezoj		33.19
Subvencio		5.000.00

Elspezoj :

Licencpago	14.682.00
Krompago	2.000.00
Sekretariejo	1.143.80
Afranko	4.109.62
Materialoj	1.998.48
Transportoj	895.94
Vojaĝelspezoj	621.42
Rentumo	147.44
1-a bulteno	1.492.75
2-a bulteno	840.25
Kongreskartoj	105.65
Diversaj presaĵoj	474.20
Insigno	2.403.10
Glumarkoj	76.28
Interkona vespero	1.669.50
Kongresa balo	3.099.76
Propagando	1.596.72
Teatra vespero	3.939.92
Gazetara servo	3.572.10
Kurzperdo	318.47
Tivoli	750.00
Inaŭguro	3.193.47

Kongresejo	4.681.60
ISU	2.662.50
Kongreslibro	12.968.95
Subvencio al fakkunveno	216.30
Diversaj elspezoj	2.783.64
Saldo	15.878.15
	<hr/>
	88.322.01
	88.322.01

Kopenhago, la 5-an de novembro 1957.

La revizoroj :

Sv. Dragsted — A. Holst — O. Jensen

★

★

★

42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

3-10 aŭgusto 1957 — MARSEILLE — Francujo

BILANCO

Enspezoj :

	fr.fr.	fr.fr.
Kotizoj		2.577.300
Krompagoj de nemembroj de UEA		142.200
Anoncoj		195.420
Glumarkoj		10.167
Subvencioj		370.000
Kurzogajnoj		1.600
Loĝiga Servo		213.543
Ekskursoj		287.993
Fotoj		2.715
Libro-Servo		29.531
Bufedo		67.200
Moralaj kotizoj		171.200
Diversaj enspezoj		37.286

Elspezoj :

Afiŝoj	31.232	
Makleroj	1.037	
Sekretariejo	75.599	
Afrankoj	164.854	
Materialoj	298.927	
Transportoj	14.811	
Veturadoj	39.023	
Kongresejo	37.008	
I- Bulteno kaj aligiloj	71.850	
Kongresa karto	6.676	
Kongresa Libro	525.373	
Dua Bulteno	57.459	
Insignoj	59.252	
I.S.U.	56.000	
Teatra Vespere	269.215	
Operejo	92.391	
Propagando	105.623	
Gazetara Servo	191.769	
Licencpago	773.190	
Krompagoj	142.200	
Unuatagaj kovertoj	7.126	
Infana kongreseto	53.221	
Diversaj Elspezoj	86.386	
Saldo	945.933	
	<hr/>	
	4.106.155	4.106.155

G. C. Fighiera, K.K.S.

Raporto de la Revizoroj :

Post metoda kontrolado, la grevizoroj subskribintaj atestas pri la vereco kaj ekzakteco de la ĉi-supra definitiva bilanco.

Marseille, la 27-an de februaro 1957

J. Galland

M. Niccolini

RAPORTO DE LA ESTRARO

pri la agado de

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

en la laborjaro 1957/1958

I. ENKONDUKO

Tiu ĉi Raporto estas kunmetita de la ĝenerala sekretario laŭ la artikolo 30 de la Statuto kaj ĝi rilatas al la agado de la Estraro, oficejoj, komisiitoj kaj aliaj organoj de la Asocio en la periodo inter la 30-a de aprilo 1957 kaj la 15-a de aprilo 1958.

La Raporto koncize prezentas la ĉefajn realigojn de la Asocio en la pasinta laborjaro, kiun markas plia larĝigo de la antaŭaj aktivecoj kaj entrepreno de kelkaj novaj laboroj, ĉio laŭ la Baza Laborprogramo de U.E.A., akceptita en Bolonjo (1955) kaj reviziita en Kopenhago (1956). Estas ĝojiga fakto, ke la Asocio eniris la 50-jaran jubileon de sia ekzistado kun 27.138 membroj en 78 landoj, kio signifas kreskon de preskaŭ 4.000 membroj kompare kun la jaro 1956. La daŭra nombrokresko de la membraro en la pasintaj jaroj montras ne nur la aprobon de la esperantistaro al la sistema kaj laŭplana agado de U.E.A., sed ankaŭ la plian disvastiĝon de la lingvo.

Laŭ la sistemo, enkondukita antaŭ kelkaj jaroj, la Raporto enhavas plurajn partojn kaj subdividojn. La celo estas doni pli klaran trarigardon kaj faciligi la diskuton. Tamen, oni devas ne forgesi, ke la Raporto estas unueca tuto kaj enhavas la ĉefajn rezultojn de komuna agado de ĉiuj gvidaj instancoj kaj konsistaj partoj de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi ankoraŭfoje montras, ke per lojala kunlaborado de ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, lokaj societoj kaj sekcioj, diversaj organoj kaj unuopaj membroj — ĉio en la kadroj, tre larĝaj, de U.E.A. — estas

atingeblaj konsiderindaj rezultoj per la propraj fortoj. Tio tute ne signifas, ke estas atingita la maksimumo. Male, U.E.A. havas ankoraŭ grandajn eblecojn por plua progresado kaj por multe pli efika disvastigo de la Internacia Lingvo. Sed, por ke ĝi povu sukcese plenumi tiujn taskojn, necesas, ke ĉiuj ĝiaj konsistaj partoj — kaj ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ troviĝas ekster ĝi — ne nur komprenu la gravecon de organizita kaj monde planita laboro por la disvastigo de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ efektive agu laŭ la Statuto kaj regularoj de U.E.A., laŭ la Baza Laborprogramo, laŭ la decidoj de la kompetentaj organoj de la Asocio kaj laŭ la esenca principo kaj granda vero, ke

UNUECO ESTAS FORTO !



II. GENERALAĴOJ

1) **Jura Personeco.** Jam antaŭ unu jaro estis petita la jura personeco en Nederlando. La procedo daŭris iom longe ĉar temas pri internacia organizaĵo, kio kaŭzas en la kadro de nacia juro kelkajn problemojn. Tamen, post plurfoja trastudado de la Statuto en la koncerna ministerio, per Reĝa Dekreto No. 49 de la 22-a de marto 1958 la jura personeco estas certigita al U.E.A.

2) **Estraro.** Ne okazis ŝanĝo en la konsisto de la Estraro. Kvankam S-ro Mabesoone intertempe definitive demisiis pro sia nankato, la Komitato en Marseille decidis alelekti novan estraron en lia loko. Restas do: Prof. D-ro G. Canuto, Prezidanto, Prof. D-ro I. Lapenna, Ĝenerala Sekretario, H. W. Holmes O.B.E., Vic-Prezidanto, D-ro Ing. G. Azzi (kulturaj aferoj), D-ro W. Herrmann (landaj, fakaj kaj neneŭtralaj asocioj), R. Llech-Walter (financoj).

3) **Komitato.** La Komitato konsistas nun el 54 Komitatanoj A, B kaj C (en 1956 estis 50 Komitatanoj). En Marseille estis alelektitaj S-ino Emilija Lapenna kaj S-roj G. Becker kaj J. Thierry kiel Komitatanoj C, dum unuan fojon eniris la Komitaton reprezentanto de aliĝinta faka asocio (ISAE), Prof. P. Popovic. Ankaŭ unuan fojon eniras la Komitaton observanto de aliĝinta landa asocio kun malpli ol 150 membroj. La Komitato havis 3 kunidojn de la Pleno dum la U.K. en Marseille. Ceestis 32 Komitatanoj aŭ anstataŭantoj. La Komitato laboris denove en 5 komisionoj, kiuj siavice havis plurajn kunidojn. Ekster la Kongreso la Komitato laboris dum la jaro per cirkuleroj kaj korespondado.

4) **Landaj Asocioj.** Aliĝis en tiu ĉi jaro Urugvaja Esperanto-Societo, kiu ne atingis ĝis nun la minimuman membronombbron por havi Komitatanon A, sed havas observanton, D-ro R. Zeballos Morales. U.E.A. nun havas 25 aliĝintajn landajn asociojn. Iliaj raportoj troviĝas en la aldono al tiu ĉi Raporto.

5) **Aliĝinta Faka Asocio.** En Marseille la Komitato akceptis kiel aliĝintan fakan asocion I.S.A.E., laŭ art. 14 de la Statuto kaj tuj ĝia Komitatano partoprenis la Komitatkunidojn.

6) **Fakaj kaj Specialigitaj Asocioj.** La 25-an de oktobro 1957 U.E.A. faris kontrakton pri kunlaboro kun la Internacia Asocio de Juristoj Esperantistaj kaj la 15-an de decembro 1957 kun la Internacia Verkista Asocio. Tiajn kontraktojn U.E.A. havas nun kun 15 specialaj asocioj.

7) **Junularsekcio de U.E.A.: T.E.J.O.** Ĝi establiĝis kiel memstara sekcio de U.E.A. kun propra Statuto aprobita de la Komitato de U.E.A. Ĝia raporto troviĝas sub ĉapitro X.

8) **Fondaĵoj.** Pri Garantia kaj Eldona Fondaĵoj oni vidu la kontojn en la financa raporto. Pri la Fondaĵoj - Ekspozicio, - Oficeja Ilaro, - A.P.O. estas regule raportata en la revuo. La kontribuoj de la membroj al tiuj ĉi fondaĵoj, tiel gravaj por la progresigo de la Movado, ne estas tute kontentigaj.

9) **Lernejoj.** La gvidanto de la agado ĉe la lernejoj, la estinta prezidanto de U.E.A., S-ro E. Malmgren, daŭrigis la klopodojn. Bonega rezulto estas atingita en Jugoslavio, kie en kelkaj lernejoj okazas devigaj kaj en multaj aliaj nedevigaj Esperanto-lecionoj. Ankaŭ en Danlando la agado progresas kontentige. En aliaj landoj la klopodoj estas daŭrigataj.

10) **Specialaj Servoj de U.E.A.** La Korespondanta Servo Mondskala memstare funkciinta jam de pluraj jaroj, daŭrigis sian utilan laboron ankaŭ en tiu ĉi jaro, sub la lerta gvidado de S-ro Daniel Luez en Francujo kaj peris sennombrajn korespondantojn. La Magnetofona Servo, gvidata de S-ro Eichholz en Kanado nur komencis sian agadon en tiu ĉi jaro kaj devas ankoraŭ elkreski. Ankoraŭ pli nova estas la Filma Servo, gvidata de K.K.S., S-ro G. C. Fighiera. Tiu Servo, kiu ankoraŭ ne plene establiĝis pro la malfacilaĵoj transporti la filmojn de lando al lando, sendube montriĝos granda helpo poravigo de la vivo en la grupoj.

(11) **50-jara jubileo de U.E.A.** La 28-an de aprilo estis la 50-a datreveno de la fondiĝo de UEA. Tiuokaze la aprila numero de "Esperanto" estis dediĉita al la Asocio kaj al la ĉefaj eventoj el ĝia historio. En Mainz, dum la U.K., okazos speciala festo por memorigi la datrevenon.

III. ADMINISTRADO KAJ FINANCOJ

A) CENTRA OFICEJO

1) **Oficeistoj.** En la Centra Oficejo laboras krom la Direktorino du tuttonagaj oficistoj kaj du duontagaj. Plue duontagan deĵoron libervolan ankoraŭ daŭre faras S-ro J. Th. de Goeij, sinofera helpanto ekde la starigo de la oficejo en Rotterdam.

2) **Membraro.** Post publikigo de la jara statistiko en "Esperanto" venis ankoraŭ pliaj pagoj por la pasinta jaro, tiel ke la definitiva nombro fariĝis 27.408 membroj en 78 landoj laŭ jena divido: AM 19.851; MJ 831; MA 5554; MS 684; Pat. 5; DM 315; HM 52; J-MJ 15; J-MA 101. La membronombro estas pli alta ol iam antaŭe en la historio de la Asocio. Sur la sojlo de sia ora jubileo ĝi kolektis veran armeon de pacaj batalantoj. En 1956 la membronombro estis 25.181 en 1955 ĝi estis 21.763, en 1954: 17.001.

3) **Delegitoj.** En la fino de 1957 estis entute 2539 delegitoj en ĉiuj kategorioj (2338 en 1956). El ili estis 1232 delegitoj, 209 vicdelegitoj kaj 1098 fakdelegitoj. Ĉiam estas ankoraŭ eble plilarĝigi la delegitan reton. Ju pli varia ĝi estos, des pli efika. Pluraj delegitoj uzis la eblecon fariĝi fakdelegito pri pli ol unu fako. La C.O. klopodas kiel eble plej bone kontroli la seriozecon de la fakoj kaj la kompetentecon de la funkciuloj.

4) **Jarlibro.** La Dua Parto de Jarlibro 1957 aperis en Novembro. Same kiel la antaŭa ĝi enhavis 96 paĝojn. Ĝi estis eldonita en 8000 ekzempleroj. La Estrara Raporto ampleksis 68 paĝojn. Krom la kutimajn informojn pri Komitato kaj kotizoj, ĝi enhavis la Statuton de T.E.J.O. La Unua Parto de Jarlibro 1958 bedaŭrinde suferis prokraston pro neantaŭviditaj cirkonstancoj. Ĝi aperis komence de junio kun 393 paĝoj en 8000 ekzempleroj. Necese estas varbi ĉiam pli da reklamoj por la Jarlibro, kiu prezentas unikan eblecon de samtempa reklamado en 80 landoj. Dezirata estas pli da aktiveco de la membroj kaj delegitoj tiurilate. En la Dua Parto de Jarlibro 1958 aperos la Gastronomia Terminaro. Por helpi en la pliaj kostoj de tiu eldonaĵo, bezonataj estos multaj reklamoj de restoracioj kaj hoteloj.

5) **Libroservo.** Ĝi funkcias tre kontentige kaj donis pli altan profiton ol lastjare. Grandan problemon kaŭzas ankoraŭ la malebleco ricevi pagojn el orient-eŭropaj landoj, kie la soifo je literaturaĵoj estas plej granda. Estas evidente ke kiam malfermiĝos tiuj landoj, la klientaro de la libroservo tuj multobliĝos.

6) **Eldona Fakoj.** Dum la jaro daŭre vendiĝis la bonega verketo de Jean Ribillard: "Vagado sub Palmoj". Precize unu jaron post ĝia apero, U.E.A. eldonis sian unuan grandan verkon, Angla Antologio, redaktitan de W. Auld kaj R. Rossetti. Intima kunlaboro kun la presejo rezultis tre bele prizorgitan, tamen malmultekostan volumon eldonitan en 3000 ekzempleroj. Antaŭ ĝia apero la C.O. kolektis jam pli ol 300 antaŭmendojn kaj poste la verko tre kontentige disvendiĝas.

7) **Gazeto.** La revuo "Esperanto" aperis en 1957 en 7500 — 8000 ekzempleroj. En januaro 1957 ĝi ŝanĝis sian aspekton. La flava-nigra kovrilo estis anstataŭita de alia klišo dum la koloro estis ĉiumonate ŝanĝata, laŭ la reagoj tre plaĉe al la legantaro. En 1958 tiu sistemo estas daŭrigata, sed nova kovrildeseĝnaĵo estis aplikata laŭ projekto de juna talenta desegnistoj esperantista, Jan Schaap. La revuo tre regule kaj akurate aperadis dum 1957, dank' al perfekta akordiĝo inter redaktoro, presisto kaj C.O. En la komenco de 1958 kelkaj numeroj havis prokraston, precipe la aprila, kiu pro sia jubilea karaktero postulis multege pli da preparado kaj prizorgado. Baldaŭ poste la akurateco revenis.

8) **Belarto,** literatura-kultura aldono al "Esperanto". Ĝi aperis en la fino de aprilo 1958 kun 72 paĝoj en 3000 ekzempleroj. Antaŭ ĝia apero estis kolektitaj jam pli ol 700 antaŭmendoj. Redaktis ĝin la redaktoro de "Esperanto", W. Auld, kaj kunlaboris aro da eminentaj verkistoj kaj aliaj artistoj. Krom literaturaĵoj ĝi enhavas artikolojn pri pentroarto kaj lingvistiko, kiel ankaŭ muzikafonojn. Artan kovrilpaĝon desegnis Jan Schaap, kiu cetere kontribuis per pluraj altnivelaj ilustraĵoj. Plue ornamas la eldonaĵon kolora reproduktaĵo de fama pentraĵo. Entute la valora kajero ne havas precedencon en la Esperanto-Movado. Apartan dankon meritas la presisto pro la bela teknika prizorgado.

9) **Internaciaj Konkursoj.** Ankaŭ en 1957 okazis du konkursoj. En la plifortaj landoj gajnis Usono. Malgraŭ siaj malfacilaj enlandaj cirkonstancoj koncerne la movadon, ĝi brile venkis kun ne malpli ol 159.97%, dank'al sindona laboro de la ĉefdelegito kaj multaj delegitoj kaj simplaj membroj. En la malpli fortaj landoj gajnis Argentino kun 134.89%. Post forresto el la konkursoj dum pluraj jaroj, ĝi tuj post reveno venkis, precipe dank'al energia varbado de dumvivaj membroj. Ambaŭ landoj ricevis libropremion en valoro de 100.- gld.

10) **Apogantoj.** La kampanjo pri Apogantoj ankoraŭ ne donis kontentigan rezulton. Malgraŭ modela laboro de kelkaj fidelaj membroj, inter kiuj F-ino Marjorie Boulton ankoraŭ estas la rekordulino, la nombro da varbitoj restis ĝis nun sub la atendoj. Energia varbado de ĉiuj membroj povus grave helpi al la Asocio kaj povus i.a. ebligigi pli da subteno al nepagipovaj landoj.

11) **Orienteŭropaj landoj.** La revivigo de la movado en tiuj landoj daŭras. Amase venas aliĝpetoj, bedaŭrinde sen eblecoj transpigi la kotizojn. La plimulto de la tieaj membroj ankoraŭ dependas de adoptiĝo. Tre prema fariĝis la situacio en Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio kaj Bulgarujo, kie kolektiĝis tre multaj kotizoj, kien la Asocio regule liveras siajn eldonaĵojn, sed de kie estas maleble venigi la monon. Limigo de aliĝoj pro tio estas neevitebla.

B) SERVA CENTRO

La Hon. Administranto sendis jenan raporton :

(1) **Biblioteko.** "Nenio speciala citinda rilate je 1957. La skribado de la slipoj estas daŭrigata, tiel ke baldaŭ la ĉefa kartoteko estos en ordo. Estas antaŭvidate, ke la pli granda parto de la biblioteko estos transportita en Rotterdam en 1958. Dependas de diversaj detaloj, pri kiuj la administranto kaj la prezidanto de UEA povos raportiti dum la U.K. en Mainz."

(2) **Ekspozicioj.** "Bedaŭrinde nia materialo nun elĉerpigis. La ricevo de turismaj eldonaĵoj, de prospektoj kaj de aliaj utilaj presajoj fariĝis temporaba, postulas korespondadon kaj diversajn kostojn. Provizore tiu ĉi servo.... ne funkcias."

(3) **Helpo.** "Regule venas petoj pri sendo de medikamentoj al samideanoj konataj al ni, meritplenaj kaj senpovaj ricevi tiun aŭ alian medikamenton ofte multekostan. Ĝis nun ni povis ĉiam interveni dank'al ricevo de medikamentoj je prezo malpli alta ol la oficiala kaj partopreno individua en la kosto. Ni ne konigas al kiu ni sendas ion (escepte al la kontrolantoj de la jarkalkulo), sed ni ĝojas ke nia interveno renkontis sinceran dankon al UEA."

Pri tiu ĉi parto de la raporto respondecas la administranto.

★

★

★

(1) **Redaktoro.** Mag. W. Auld redaktis la gazeton en la jaro 1957 kaj plue redaktas ĝin.

(2) **Formato kaj amplekso.** La formato restis la sama kiel en 1956. En 1957 aperis 11 numeroj kun sume 200 paĝoj kaj 44 paĝoj de la kovrilo, do la revuo havis en 1957 kvar paĝojn pli ol en 1956. Ĉiuj antaŭaj rubrikoj estis daŭrigitaj, kaj tri novaj debutis: Koresponda Servo Mondskala (gvidata de s-ro Luez); Saka Rubriko (gvidata de D-ro Faigl); kaj Monda Galerio. Rimarkinda estis la kresko kaj evoluo de la rubriko La Juna Vivo, oficiala paĝo de TEJO, redaktata de s-ro Nicola Minnaja. El la tuta teksto de la Revuo apartenis al Generala legaĵo 33,3 %, al Informoj 23,1 %, al Oficialaĵoj 22,8 %, al la Kongresa Raporto kaj al La Juna Vivo po 6,4 %, al Recenzoj 5,0 %, kaj al CED 2,9 %. La spacomanko daŭris dum la jaro, kaj por helpi al solvado de tiu urĝa problemo, la Komitato decidis eldoni dum 1958 72-paĝan kulturan kajeron, en sama formato kaj aspekto kiel la Revuo, kiel aldonaĵon al la Revuo.

(3) **Presejo.** Kiel en la pasinta jaro, la firmao Zwagers presis la Revuon kaj tre sindone kunlaboris por certigi akuratecon kaj teĥnikan perfektecon.

★

★

★

V. KONGRESOJ

(1) **U.K. Marseille.** La 42-a Universala Kongreso signis plian paŝon antaŭen en la evoluo de niaj postmilitaj kongresoj. Ĝiajn laborojn ĉestis oficiala reprezentanto de UNESKO kaj la kongreso mem okazis sub la ŝildo de la Prezidanto de la Franca Respubliko, S-ro R. Coty, kiel protektanto, kaj de Honora Komitato, en kiu estis reprezentitaj eminentaj nomoj de la socia kaj kultura vivo de la lando. Entute, 11 Registaroj estis oficiale reprezentitaj.

Al la kongreso aliĝis 1.468 kongresanoj el 38 landoj. La kongresejo estis en la modernaj konstruaĵoj de la Scienca Fakultato de la Universitato de Marseille. La tri sekcioj estis: 1/ "Esperanto en Edukado" (Prez. S-ro D. Kennedy), 2/ "La Internacia Lingvo en Scienco kaj Tekniko" (Prez. Prof. I. Lapenna), 3/ "Esperanto en Komercio kaj Turismo" (Prez. S-ro P. Petit). La dua kaj la tria sekcioj akceptis rezoluciojn. Dekunu fakaj asocioj havis siajn fakkunvenojn. Rimarkindaj laboroj estis tiuj de ILEI pri "Limoj de la Profesiaj Devoj de la Instruisto", de ISAE "Centro por Kultura Interŝanĝo" kaj de IFEF "Esperanto kiel Helpilo en la Kulturaj Rilatoj de la Fervojistoj". Dum la kongreso fondiĝis du novaj fakaj asocioj: Internacia Asocio de Juristoj Esperantistoj (IAJE) kaj Internacia Verkista Asocio (IVA). En ISU lekciis 6 prelegantoj el 5 landoj. La Akademio de Esperanto havis du kunsidojn, el kiuj unu estis publika. Du ĝeneralaj kunvenoj de U.E.A., kun la kutima tagordo, estis kontentige vizititaj. Okazis Belartaj Konkursoj kaj en la Operdomo estis prezentita la fama komedio de Molière "Georges Dandin", kiun siatempo tradukis el la franca D-ro L. L. Zamenhof. Aktoris la Esperantista Teatra Trupo el Barcelona kaj reĝisoris Francesco Villà. Antaŭ la prezentado la jugoslaviana aktoro S. Flego brile prezentis la monologon de Ĉeĥov "Pri la Malutilo de la Tabako". El la aliaj kulturaj aranĝoj apartan mencion meritas la du prelegoj pri la kongresa lando (S-ro H. Bourdelon kaj F-ino Colette Llech-Walter). La kongresa balo estis unu el la ĉefaj distraĵoj. Pluraj ekskursoj kaj montrado de filmoj en Esperanto kompletigis la programon. Tre sukcesinta estis

la dua Internacia Infan-Kongreseto, kiun partoprenis 16 geknaboj inter la 6-a kaj 13-a jaroj el 4 landoj.

La Urbo Marseille akceptis la tutan kongresanaron kaj la Urbestro publikigis grandan salutafison en la franca kaj en Esperanto. Ĝi pendis ĉie tra la urbo. Tramveturiloj estis ornamitaj per Esperanto-flaĝetoj kaj grandaj flagoj pendis diversloke en la urbo.

Ekster la oficiala programo okazis religiaj diservoj por katolikoj kaj protestantoj. La framasonoj havis loĝian kunvenon.

Pri la funkciado de la Kongresa Gazetara Servo vidu sub VII. Informado.

Estas enkondukitaj pluraj plibonigoj ankaŭ en la administrado. Estis aĉetita moderna adresaparato kaj ĝi restos propraĵo de U.E.A. je dispono de la universalaj kongresoj.

La kongreso finiĝis ne nur sen financa perdo, sed eĉ kun profito dank' al la lastemajnaj aliĝoj de relative multaj kongresanoj, kiel ankaŭ al la esceptaj t.n. "moralaj aliĝoj" kaj al la helpo de la Franca Registaro. La kongreson organizis sindona LKK, kies prezidanto estis S-ro H. Bourdelon kaj kiel sekretario funkciis la KKS, S-ro G. C. Fighiera. Detala raporto en "Esperanto", septembro 1957.

(2) **U.K. Mainz.** La ĉefaj temoj de tiu kongreso estos: 1/ "Reciproka Apezado de la Okcidenta kaj Orienta Kulturoj — La Rolo de la Internacia Lingvo" (Prez. Prof. Hideo Yagi, ĉefraportanto Prof. I. Lapenna), 2/ "La Lokaj Societoj — Kerno de nia Movado" (Prez. D-ro W. Herrmann, ĉefraportanto S-ro J. Strönnne). La definitiva programo, aprobita de la Estraro, estos publikigita kiel kutime. Ĝis la 15-a de aprilo entute aliĝis 1567 kongresanoj el 3 landoj. La prezidanto de la LKK estas la Urbestro de Mainz S-ro F. Stein kaj kiel sekretario funkcias la KKS, S-ro G. C. Fighiera. Detala raporto aperos en la septembra kaj oktobra numeroj de "Esperanto", 1958.

(3) **U.K. 1959.** Alvenis invitoj de Varsovio, Barcelono kaj Bruselo. Post tre atenta konsidero de la tri invitoj, la Estraro decidis, ke la U.K. en 1959, kiu havos jubilean karakteron pro la 100-jara datreveno de la naskiĝo de

Zamenhof, okazu en Varsovio. La Estraro alvokas la tutan esperantistaron multnombre ĉeesti tiun kongreson, tiel ke ĝi fariĝu la plej impona kaj la plej altnivela el ĉiuj ĝisnunaj U.K., por ke ankaŭ tiamaniere estu esprimita omaĝo al la memoro de D-ro L. L. Zamenhof.

(4) **Antaŭkongreso en Parizo.** Ĝi okazis de la 31-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1957 en la UNESKO-Palaco en Parizo, senpage disponigita por tiu celo de la Sekretariato de UNESKO laŭ la peto de U.E.A. La antaŭkongreso estis fakte ligita al la Internacia Konferenco de Popoluniversitatoj, kiu okazis sub la prezido de S-ro Pierre Petit, prezidanto de la Popola Universitato de Rosny-sous-Bois. En la Patrona Komitato estis s-ro R. Billières, Ministro de la Nacia Edukado, s-ro C. Pineau, Ministro de Eksterlandaj Aferoj kaj ankaŭ aliaj elstaraj personecoj. La debatoj de la Konferenco okazis en la franca kaj en Esperanto, tiel ke ĉiu partoprenanto povis paroli en unu el la du lingvoj, aŭ en kiu ajn alia, sed ĉio estis tradukita al Esperanto. Tiamaniere Esperanto brile servis kiel komuna pontolingvo de la Konferenco. Ankaŭ la dokumentoj de la Konferenco estis publikigitaj nur en la franca kaj en Esperanto. Partoprenis la Konferencon reprezentantoj de popolaj universitatoj el 14 landoj. Rezulte de la Konferenco fondiĝis Eŭropa Asocio de Popoluniversitatoj. Detala raporto havigebla de la komitato de U.E.A. kaj prezidinto de la Konferenco s-ro P. Petit.

(5) **Aliaj Kongresoj.** Ankaŭ en 1957 okazis pluraj aliaj internaciaj kongresoj, konferencoj kaj kunvenoj, kiuj uzis Esperanton kiel la solan oficialan lingvon. Ne estas loko ĉi tie por raportii, eĉ plej koncize pri tiuj diversaj kongresoj kaj konferencoj. Laŭ speciala enketo, kiun faris CED, en la jaro 1956 okazis entute 89 aranĝoj en 25 landoj, kun Esperanto kiel la sola oficiala lingvo. Ĉiujn ĉi aranĝojn entute vizitis 12.065 personoj, dum la nombro de aliĝintoj estis, kompreneble, pli granda. Se oni konsideras, ke, malgraŭ la klopodoj, la statistiko ne estis komplete, oni ne eraras, se oni taksos la nombron de personoj, kiuj ĉiujare uzas Esperanton en diversaj kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj kursoj je proksimume 12.000 ĝis 13.000.

VI. EKSTERAJ RILATOJ

A. UNESKO

(1) **Konsultaj rilatoj.** La rilatoj kun UNESKO plue ampleksiĝis kaj donis kontentigajn rezultojn. La ĝenerala sekretario de la Asocio estas en daŭra skriba kontakto kun la Sekretariato de UNESKO kaj kun diversaj ĝiaj departementoj. En aŭgusto 1957 la ĝenerala sekretario havis ankaŭ kelkajn personajn konferencojn kun pluraj funkciuloj de la Sekretariato. En Parizo mem la reprezentanto de U.E.A. ĉe UNESKO estas s-ro Jean Thierry, kiu estas en daŭra kontakto kun la ĝenerala sekretario kaj brile plenumas sian delikatan kaj gravan funkcion. U.E.A. ricevis la pozicion de asocio en "konsultaj rilatoj" per la decido de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo la 8-an de decembro 1954. Ĉiun kvaran ĵaron UNESKO revizias la konsultajn rilatojn kun diversaj internaciaj organizaĵoj kaj tiel ankaŭ la rilatoj kun U.E.A. estos reviziitaj de la sekvanta Ĝenerala Konferenco de UNESKO, kiu okazos fine de 1958 en Parizo.

(2) **Raporto pri la agado de U.E.A.** Responde al la demando de UNESKO ODG/NGO/708.223, U.E.A. sendis al UNESKO la 4-an de oktobro 1957 ampleksan raporton pri la agado de la Asocio en la periodo 1952-1957. La raporto koncize prezentas la celojn kaj strukturon de la Asocio kaj la ĉefajn aktivecojn, precipe la universalajn kongresojn, konferencojn kaj internaciajn kursojn, laboron de CED, funkciadon de ISU, literaturajn konkursojn, rezultojn de informado, delegitan reton, Universalan Ekspozicion, ĉefajn literaturajn verkojn, periodaĵojn, radio-elsendojn, rilatojn kun diversaj internaciaj organizaĵoj. Aparta ĉapitro estas dediĉita al la kontribuo de U.E.A. al la celoj de UNESKO: partopreno en internaciaj konferencoj, kontribuoj al Index Translationum, kontribuoj al problemoj rilatantaj la teknikan tradukadon, preteco kunlabori en la kadro de la t.n. "koordinataj eksperimentaj aktivecoj", distribuo de UNESKO-materialoj kun teksto en Esperanto, eldonado de "UNESKO-Novaĵoj", prelegoj pri UNESKO kaj ĝiaj

aktivecoj, pluraj sugestoj koncerne la Naciajn UNESKO-Komisionojn, la rilatojn kun la Neregistaraj Organizaĵoj k.a.

(3) **Partopreno en la konferencoj de NRO.** U.E.A. estis reprezentita, pere de s-ro J. Thierry, en ĉiuj konferencoj kaj kunvenoj de la Neregistaraj Organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO. Nia reprezentanto estas plue prezidanto de la subgrupo "Psikologiaj kaj Sociologiaj faktoroj Influantaj la Internacian Komprenigon". En tiu funkcio li organizis vastan enketon inter la NRO, kompreneble en interkonsento kun la Sekretariato de UNESKO kaj en kunlaboro kun la ĝenerala sekretario de U.E.A. S-ro Thierry dissendis la 1-an de decembro 1957 detalajn informojn pri la enketo al pluraj kunlaborantoj de CED. Tiu laboro estas daŭrigata.

(4) **Index Translationum.** La 29-an de marto 1958 U.E.A. sendis al la redakcio de Index Translationum la ordigitan materialon rilate la Esperanto-tradukojn por la jaroj 1955—1957 (vidu la raporton de CED).

(5) **Instruado pri U.N. kaj specialigitaj institucioj.** Per sia letero de la 28-a de novembro 1957 U.E.A. donis detalan respondon al la Sekretariato de UNESKO pri la laboroj, kiujn faris U.E.A. kaj ĝiaj organizaĵoj por la diskonigo de la laboro kaj celoj de U.N. en la pasintaj jaroj.

(6) **Scienca kaj teknika tradukado.** La 22-an de oktobro 1957 estas sendita al D-ro Holmstrom 4-paĝa korekto de eraroj rilate la Internacian Lingvon en la verko "Scienca kaj Teknika Tradukado", kiun publikigis UNESKO. D-ro Holmstrom dankis per sia letero de la 22-a de novembro kaj deklaris, ke preskaŭ ĉiuj korektoj estas akceptitaj por la dua eldono de tiu grava verko.

(7) **ICPHS.** En la pasintjara raporto (p-to VI.A.3) estis menciita la decido de la Plenumkomitato de UNESKO, laŭ kiu la Ĝenerala Direktoro estis komisiita konsulti la Internacian Konsilantaron por Filozofio kaj Humanismaj Studoj (ICPHS) pri ĝia opinio rilate la rolon de komuna lingvo en internaciaj rilatoj. U.E.A. tuj energie esprimis sian starpunkton en la letero de la 11-a de februaro 1957 al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO. La starpunkto de

U.E.A. estis, ke rilate Esperanton ICPHS devas preni la konstatojn el la Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 kiel elirpunkton de siaj studoj. U.E.A. plue postulis, ke, se ICPHS entute povos okupiĝi pri tiu afero, en la koncerna komisiono U.E.A. estu reprezentita almenaŭ de 3 alte kvalifikitaj personoj, kiuj scias Esperanton. Post personaj konversacioj kaj interŝanĝo de pluraj leteroj, fine la ĝenerala sekretario de ICPHS informis, ke la Konsilantaro decidis ne okupiĝi pri tiu afero. Detaloj pri la tuta afero en la cirkulero UEA/UNESKO/15 de la 26-a de novembro 1957.

(8) **Naciaj UNESKO-Komisionoj.** U.E.A. denove donis sugestojn rilate reprezentigon en la naciaj UNESKO-Komisionoj. Tiurilate la plej bonajn rezultojn atingis la jugoslaviana, brazila kaj novzelandaj landaj asocioj. Pli frue en multaj landoj estis sufiĉe malfacile starigi kontaktojn kun la naciaj UNESKO-Komisionoj, ĉefe pro la organizaj mankoj de la komisionoj mem. Tamen, en la lasta tempo venis sugestoj el la UNESKO-medioj mem por plibonigo de la laboro de la naciaj komisionoj. Speciale bonaj ŝancoj por kunlaborado prezentigis en Italujo, Francujo, Svislando, Belgujo kaj Germanujo, pri kio la ĝenerala sekretario atentigis la kunlaborantojn en la koncerna landoj. La landaj asocioj devus fari novajn klopodojn por efika kunlaborado, tute speciale okaze de gravaj datrevenoj, kiel ekzemple la Tago de la Homaj Rajtoj, kiu estos ĉie festata en decembro 1958.

(9) **UNESKO-Novajoj.** U.E.A. daŭrigis la eldonadon de tiu bulteno (vidu sub Informado). Ĉi tie estas necese menciigi, ke en la pasinta laborjaro multaj Esperantogazetoj utiligis la informojn el la bulteno. Entute estas registritaj 381 informoj pri UNESKO en la Esperantogazetaro, sed verŝajne tiu nombro estas pli granda, ĉar ne estis eble kontroli ĉiujn gazetojn.

(10) **Esperanto en UNESKO-publikaĵoj.** En diversaj publikaĵoj kaj dokumentoj de UNESKO estis ankaŭ en la pasinta jaro plurfoje donitaj informoj aŭ pri Esperanto aŭ pri arangoj en kunligo kun Esperanto. Pri tio aperis informoj en la oficiala organo de la Asocio.

B. UNUIGINTAJ NACIOJ

(1) **Konsultaj Rilatoj.** La pozicio restis sama, kiel en la pasinta jaro. La konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilo de U.N. estas aŭtomata sekvo de la konsultaj rilatoj kun UNESKO.

(2) **Tago de U.N. U.E.A.** atentigis ĉiujn landajn asociojn pri la Tago de U.N. kaj donis kelkajn sugestojn pri organizo de diversaj aranĝoj tiuokaze. En 11 landoj, en tiu aŭ alia formo, la Esperanto-organizaĵoj memorigis tiun tagon.

(3) **Tago de la Homaj Rajtoj.** U.E.A. atentigis ankaŭ pri tiu datreveno kaj sugestis aranĝojn, eventuale en kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj. Nur en 9 landoj la Esperanto-organizaĵoj memorigis tiun tagon. Detala raporto pri la aranĝoj okaze de la Tago de la Homaj Rajtoj, kiel ankaŭ de la Tago de U.N., estas sendita al la landaj asocioj kaj al la komitatanoj per la cirkulera letero 29/1958. Estas tre bedaŭrinde, ke la landaj asocioj ne donis pli da atento al tiuj sugestoj. La rezultoj ne povis esti raportitaj al U.N., nek al UNESKO, ĉar ili estis tro modestaj kompare kun la forto kaj efektivaĵoj eblecoj de la Esperanto-Movado.

(4) **Tago de la Homaj Rajtoj 1958.** La 10-an de decembro 1958 en la tuta mondo estos festata la 10-jara datreveno de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. U.E.A. estas invittita kunlabori kaj estas ne nur dezirinde, sed vere necese, ke ĉiuj landaj asocioj kaj lokaj grupoj festu tiun tagon laŭ la sugestoj, kiujn ili ricevos ĝustatempe de U.E.A.

(5) **U.N. Afiŝoj.** En la pasinta laborjaro estis eldonitaj, dank' al interveno de U.E.A. kaj de ELNA, afiŝoj de U.N. kun mallonga teksto en Esperanto.

C. EŬROPA KAMPANJO.

(1) **Nuna Stato.** D-ro W. Herrmann, kiel komisiito de U.E.A., daŭrigis la laboron sur tiu kampo. La "Naŭ Tezoj pri la Eŭropa Lingvoproblemo" estas disvastigitaj en minimume 8.000 ekzempleroj kaj komence de marto 1958

estas presitaj pliaj 5.000. La Naŭ Tezoj estis forsenditaj precipe al parlamentanoj. Informa laboro estas farita en la medioj de eŭropaj federalistoj.

(2) **Pliaj Paŝoj.** Laŭ la ekzemplo de la urbestro de Lourdes, kiu en la jaro 1952 faris enketon inter la urbestroj de Francujo pri la ebla solvo de la lingvo-problemo per Esperanto, la komisiito iniciatis pli grandkalan enketon en la tuta Eŭropo. Kiel enketanto funkcios speciala komitato de urbestroj sub la prezido de la ĉefurbestro de Mainz. La enketo troviĝas en komenca stadio. Detaloj estas senditaj al ĉiuj kunlaborantoj kaj al la komitatanoj per la cirkulero de la 8-a de marto 1958.

D. UNIO DE ASOCIOJ INTERNACIAJ

(1) **Rilatoj.** U.E.A. plue estas kunlaboranta membro de tiu organizaĵo kaj havas kun ĝi tre bonajn rilatojn.

(2) **Associations.** La monata organo de U.A.I. plurfoje informis pri la aktivecoj de la Esperanto-organizaĵoj. Estas necese substreki, ke "Associations" ĉiam volonte publikigas mallongajn informojn pri ĉiuj estontaj internaciaj kongresoj, sed, kompreneble, estas necese, ke la organizantoj sendu la informojn. U.E.A. plurfoje atentigis pri tio la fakajn asociojn, sed ne ĉiuj ankoraŭ komprenis la utilon de tia informado. La U.K. estas daŭre anoncata.

F. ALIAJ RILATOJ

(1) **Arnhem.** La Organiza Komitato de la Lingva Konferenco, kiu planis eksperimentajn kursojn de la angla, franca, germana kaj Esperanta lingvoj en lernejoj, devis rezigni pri la ideo pro manko de rimedoj.

(2) **Konferenco pri Scienca kaj Teknika Tradukado.** Tiu konferenco okazis en Londono la 5-an de marto 1958 sub la prezido de D-ro J. E. Hölmstrom, Departamento de Naturaj Sciencoj de UNESKO. La konferenco pritraktis plurajn problemojn en ligo kun la ĉeftemo. Laŭ la invito de la organizintoj, en la laboro de la konferenco partoprenis U.E.A. pere de la Direktoro de CED. (Vidu la raporton de CED).

(3) **Internaciaj Organizaĵoj.** La kontaktoj kun la aliaj internaciaj organizaĵoj daŭre kaj sisteme vastiĝas. Parto de tiuj rilatoj realiĝas pere de CED, kiu sendas siajn dokumentojn ankaŭ al la plej gravaj NRO. Aliaj rilatoj efektiviĝas per la kunlaborado inter la NRO en la kadro de UNESKO. Al la kongreso en Marseille estis invitataj 125 gravaj internaciaj asocioj en konsultaj rilatoj kun UNESKO. Al ili estis senditaj materialoj pri la kongreso. Al la kongreso en Mainz estos invitataj sendi siajn observantojn ĉiuj internaciaj organizaĵoj laŭ la jarlibro de UAI. Estos aldonita la programo de la kongreso kaj diversaj informaj materialoj. Grava manko sur la kampo de kontaktoj kun aliaj internaciaj organizaĵoj estas, ke la esperantistaj fakaj asocioj, kun la escepto de kelkaj kazoj, aŭ tute ne rilatas kun la samfakaj neesperantistaj organizaĵoj, aŭ tiuj rilatoj estas tre nesufiĉaj. Al tiu demando la fakaj asocioj devus dediĉi la plej grandan atenton.

★

★

★

(1) **Bazaj Principoj.** En novembro 1957 la I.F. de U.E.A. denove sendis al ĉiuj landaj I.F., al la landaj asocioj sen I.F. kaj al la rektaj kunlaborantoj la dokumenton "Bazaj Principoj de Informado pri Esperanto", akceptitaj en Frostavallen en julio 1956. La plimulto ĉiam pli kaj pli observas tiujn utilajn fundamentajn principojn, sed ankoraŭ kelkloke oni informas pri Esperanto laŭ netaŭgaj metodoj kaj kun asertoj neĝustaj, kiuj malutilas al la afero de la Internacia Lingvo kaj al la prestiĝo de la Esperanto-Movado. Estus tre bone, se ĉiuj landaj I.F. kaj ankaŭ la landaj asocioj, kiuj ankoraŭ ne organizis specialan I.F., rekonsiderus tre serioze la enhavon de tiu principaro kun la celo realigi ĝin, eventuale adaptante ĝin al la specialaj cirkonstancoj de la propra lando.

(2) **Landaj I.F. kaj Kunlaborantoj.** La I.F. de U.E.A. havis fine de la laborjaro 93 rektajn kunlaborantojn en 32 landoj. La I.F. de U.E.A., krome, rilatas kun ĉiuj aliĝintaj kaj nealiĝintaj landaj asocioj, al kiuj ĝi sendas siajn cirkulerojn, bultenojn kaj, en pli gravaj okazoj, specialajn artikolojn. La materialoj estas tradukataj en la naciajn lingvojn kaj publikigataj. Ekzemple la artikolo "Sepdek Jaroj de la Internacia Lingvo", kiu aperis unue en "Heroldo" kaj en "Esperanto" estis entute publikigita, laŭ la nekompletaj informoj ricevitaj el diversaj landoj, en 112 gazetoj kaj revuoj en jenaj naciaj lingvoj: angla, hispana, japana, greka, sveda, finna, germana, serbaj-kroata, portugala, norvega, rumana, hungara, slovena, ĉeĥa, franca kaj itala.

(3) **I.G.S.** En la pasinta laborjaro aperis 16 pliaj numeroj de la Esperantlingva bulteno. Entute ĝis nun aperis 66 numeroj, 242 informoj. La Bultenon redaktas s-ro G. C. Fighiera. Ĝi estas sendata al ĉiuj landaj asocioj kaj kunlaborantoj. La Bulteno estas redaktata laŭ la principoj starigitaj de la Informa Fakoj de U.E.A.

(4) **Angla-Franca Bulteno de la I.G.S.** Tiu ĉi bulteno estas eldonata en la angla kaj franca lingvoj, kaj ĝi estas sendata al ĉ. 200 elektitaj gazetoj kaj revuoj en landoj

sen Esperanto-Movado. Al ili estas sendataj ankaŭ la plej gravaj dokumentoj de CED en diversaj lingvoj. Entute aperis, ekde la 1-a de marto 1957, 12 numeroj.

(5) **UNESKO-Novajoj.** Tiu ĉi speciala bulteno kun elektitaj novaĵoj pri UNESKO estas publikigata en la kadro de la konsultaj rilatoj kun UNESKO. La Esperanto-gazetaro abunde utiligis la novaĵojn. Ĝis nun aperis 10 numeroj de la bulteno. Ekde la 5-a numero ĝin redaktas Mag. W. Auld.

(6) **Kongresa Gazetara Servo.** Ĝi faris plian progreson en Marseille. Dank' al la agado de la KGS, 358 informoj kaj artikoloj aperis en pli ol 44 milionoj da gazetekzempleroj en Francujo kaj en nekalkulebla nombro en aliaj landoj. Pluraj intervjuoj okazis por francaj kaj eksterlandaj radio-stacioj. Grandaj gazetoj en Italujo kaj Britujo komisiis specialajn senditojn verki artikolojn. Sep diversaj artikoloj por aperigo en nacilingvaj gazetoj estis menditaj centkvindek fojojn. La efektiva organizanto de la KGS estas la KKS, kiu brile plenumas tiun taskon. La KGS laboras en la kadro de la I.F. de U.E.A. kaj laŭ la principoj starigitaj de ĝi. Estas utile menciigi, ke la KGS laboras ne nur dum la kongresa semajno, sed fakte dum la tuta kongresa jaro, sendante daŭre informojn al la gazetaro, al la radio, organizante gazetarajn konferencojn, liverante artikolojn kaj fotojn.

(7) **Seslingva Flugfolio.** Ĝis nun ĝi estas entute eldonita en 100.000 ekzempleroj kaj ĝi estas daŭre disdonata al la membroj de diversaj internaciaj kongresoj. La C.O. de U.E.A. atentigas la landajn asociojn pri la pli gravaj kongresoj, okazontaj en la respektivaj landoj, tiel ke oni povu ĝustatempe mendi sufiĉan kvanton por distribuo. Kelkaj landaj asocioj, aŭ unuopuloj, agas tre bone tiurilate, sed aliaj malatentas tiun eblecon de informado. Estas menciinde, ke s-ro C. Thollet, komitatano de U.E.A. disdonis la flugfoliojn, al kiu estis aldonita teksto ankaŭ en la araba lingvo, al ĉiuj partoprenintoj de la UNESKO-Konferenco de la arabaj landoj en Fez, fine de januaro 1958.

(8) **Agado Sekelj en Hindujo.** En la pasintjara raporto estis esprimita la espero, ke la agado de Lic. T. Sekelj, komitatano de U.E.A., rezultigos kernon de Esperanto-

Movado en Hindujo. La esperoj realiĝis. Estas fonditaj Esperanto-societoj en Bombay, New Delhi kaj Kathmandu. Nun estas fondata Esperanto-societo en Madras, kie s-ro Sekelj instruas la lingvon al 25 lernantoj. Tuj post la fondo de tiu societo s-ro Sekelj vojaĝos al Cejlono, kie li intencas fondi societon kun la helpo de kelkaj esperantistoj loĝantaj tie. Ĉar la Esperanto-Movado en Hindujo, Nepalo kaj Cejlono estas ankoraŭ tro malforta, s-ro Sekelj planas la fondon de Sudazia Esperanto-Federacio, en kiun enirus ĉiuj societoj de Hindujo, Nepalo kaj Cejlono, eventuale ankaŭ la societoj de la aliaj najbaraj landoj. La preparlaboroj jam komenciĝis. La Estraro esprimas gratulon al s-ro Sekelj pro lia tre sindona kaj klera agado por la Internacia Lingvo en la landoj de Azio.

(9) **Resumaj Ciferoj pri Informado.** Tabela trarigardo pri la informa laboro, farita en 1957, kun akompana artikolo aperis en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto". Ĉi tie estas donitaj nur la resumaj ciferoj kaj parenteze troviĝas, por komparo, la ciferoj por la jaro 1956:

Entute alvenis respondoj de 29 (31) landaj asocioj aŭ kunlaborantoj. En 1957 entute aperis 7.817 (7.178) artikoloj kaj 10.508 (8.191) informoj pri Esperanto en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Okazis 909 (925) prelegoj pri Esperanto, kiujn ĉeestis 69.430 (73.597) personoj. Estis disaŭditigitaj 2.367 (1.924) nacilingvaj prelegoj aŭ prelegetoj per radio. Estis aranĝitaj 194 (224) ekspozicioj, kiujn vizitis 957.180 (249.435) personoj. Entute estis disdonitaj 251.000 (462.970) afiŝoj, flugfolioj, broŝuretoj kaj similaj propagandiloj. Generale la interesiĝo pri Esperanto plue konsiderinde kreskis.

(10) **Mankoj.** Kvankam la informado sendube konsiderinde progresis en la lastaj jaroj kaj el vidpunkto de la enhavo kaj el tiu de la formo kaj metodoj aplikitaj, tamen estas facile rimarkeblaj ankoraŭ multaj gravaj mankoj. Krom la enkonduke menciitaj — malatento al la fundamentaj principoj — estas ankaŭ aliaj. Pluraj landaj asocioj tute ne organizis Informan Fakon en la vera senco de la vorto. Aliaj havas fakte nur gazetaran

servon, sed ne prizorgas la aliajn formojn de informado: prelegojn, ekspoziciojn, flugfoliojn, afiŝojn, radio-informojn, televidon k.t.p. Tamen, la ĉefa, la plej ĝenerala kaj la plej grava manko estas, ke la du aliaj ĉefaj aktivecoj — instruado kaj praktika aplikado — aŭ ne estas ligitaj al la informado aŭ eĉ tute forestas. Estas tute vane fari eĉ la plej bonan informadon, se oni ne organizas samtempe efikan instruadon de la lingvo. Estas tute vane eĉ efike instrui la lingvon, post taŭga informado, se oni ne montras la vojon al la lernintoj por la utiligo de la lingvo. Kaj la unua ŝtupo por la utiligo de la lingvo estas la praktikado de Esperanto en la lokaj socioj kaj grupoj. Pro la graveco de tiu problemo, la Estraro decidis ke la Dua Sekcio de la Kongreso en Mainz pritraktu ĝin.

(1) **I.S.U.** La Deka Laborperiodo okazis en Marseille de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto. Kiel rektoro funkciis Prof. G. Waringhien kaj kiel sekretario funkciis Mag. R. Rossetti. Prelegis: Prof. D-ro I. Lapenna pri "La Suvereneco kaj la Federacia Principo"; Prof. D-ro H. Sirk pri "La Uzo de Radiokarbono por la Determino de la Aĝo de Organikaĵoj"; Mag. W. Auld pri "Internaciaj Aspektoj de la Anglalingva Poezio de la XX-a Jarcento"; Lekt. M. Boulton pri "Enkonduko en la Internacian Semantikon"; Lekt. C. Stöp-Bowitz pri "La Parenceco inter Vertebruloj"; Prof. D-ro G. Canuto pri "Kio Postrestas el la Teorioj de Cesare Lombroso"; S-ro Ivo Rotkvić pri "Esperanto kaj Literaturo". Mag. Reto Rossetti rezignis pri sia funkcio pro troa okupiteco. La Estraro esprimis al li dankon pro la plenumita laboro kaj elektis Lektorinon Marjorie Boulton kiel sekretariinon de I.S.U.

(2) **Publikigo de I.S.U. Prelegoj.** En interkonsento kun ISAE, Scienca Revuo daŭrigis la publikigon de selektitaj prelegoj, faritaj en la I.S.U. En la numero 2/3 de marto 1958 estas publikigitaj la prelegoj de Prof. D-ro Hugo Sirk "Ĉu Oni Povas Vidi la Atomojn", de Lekt. M. Boulton "Enkonduko en la Internacian Semantikon", de Rektoro K. Söderberg "Kion la Socio Povas kaj Devas Fari por Utiligi la Talentulojn".

(3) **Belartaj Konkursoj.** En la Belarta Konkurso partoprenis ĉi-jare 31 konkursantoj el 16 landoj. Plej multe da premioj gajnis Marjorie Boulton. Detaloj en la septembra numero de "Esperanto", 1957, p. 128.

(4) **Kulturaj Internaciaj Ferioj Grésillon.** Interkonsente kun U.E.A. kaj sub aŭspicioj de U.E.A. la Esperantista Kulturdomo en Grésillon organizis de la 14-a ĝis 24-a de julio 1957 Internacian Seminarion pri la Kulturoj kaj Civilizoj de la Mondo. Prelegis Mag. W. Auld, D-ro A. Albault, Ing. R. Watier, Prof. G. Waringhien kaj Prof. I. Lapenna. Ĉiu el la prelegintoj donis po tri lekcionoj, en kiuj estis pritraktitaj la problemoj de la ĉeftemo el vidpunktoj de spirita kulturo, biologia, teknika, kun

aparta konsidero al la laboro de UNESKO sur la kampo de interkonigo de la kulturoj. Okazis pluraj ekskursoj al la kasteloj, filmprezentadoj, distraj vesperoj. La arango estis utiligita ankaŭ por debatoj pri informado, la nuntempa Esperanto-literaturo, pri lingvaj demandoj, CED kaj ĝia rolo. Partoprenis sesdeko da personoj el 13 nacioj. La arango estis ĉiurilate tre sukcesa. "UNESKO Features" mallonge raportis.

(5) **Eldono de Angla Antologio.** Vera kultura evento estis la eldono de Angla Antologio 1000-1800, redaktita de W. Auld kaj R. Rossetti. Tio ĉi estas la dua verko, publikigita de la Eldona Fako de U.E.A. La verko kontentige disvendigis. Tuj post la rehavigo de la investita kapitalo por la eldono de tiu verko, estos eldonita per la sama sumo plia grava verko.

(6) **Gramofondiskoj.** Ili plue disvendigas tre kontentige.

(7) **Magnetofona Servo.** En la laborjaro 1957-1958 tiu-ĉi nova servo (kies Komisiito estas S-ro Rudiger Eichholz, Esperanto Press, Oakville, Ont. Kanado), kiu estis fondita en aprilo 1957, komencis doni la unuajn fruktojn kaj montriĝis, ke ĝi helpas efike la diskonigadon inter la esperantistaro de gravaj prelegoj, teatraĵoj, deklamoj, kantoj k.t.p.

En la unua jaro estis akiritaj 5 registraĵoj faritaj en Grésillon dum la Kulturaj Internaciaj Ferioj. Pere de radio Zagreb estas nun havigataj la valoraj surbendigoj, faritaj de tiu stacio dum la U.K. en Marseille. La KKS prizorgos la surbendigon de la ĉefaj eventoj dum la U.K. en Mainz. Estas havigita ankaŭ prelego de P. Thorsen "Tri Nobelpremiitoj en la Dana Literaturo" (farita en la I.S.U. 1956) kaj, de la sama parolanto, "Dekdu Poemoj el Rozoj kaj Urtikoj". Nun estas surbendigataj ĉefaj popolkantoj. En la unuaj du monatoj de 1958 estas menditaj 5 sonbendoj kun entute 15 programeroj. Por la komenco tio estas kontentiga. La komisiito de U.E.A. faras tre bonan laboron, sed li bezonas helpo de interesigantoj tra la mondo. La landaj asocioj kaj lokaj grupoj devus vaste utiligi tiun servon por plibonigi diversajn arangojn.

La sonbendoj de Kanado jam trakuras la esperantistan mondon, kaj ju pli la magnetofona servo populariĝos des pli fariĝos evidenta ĝia graveco. Sciigoj pri la nova servo aperis en angla-

lingva kaj germanlingva specialigitaj revuoj por "voĉpandantoj".

(8) **Korespondanta Servo Mondskala.** La K.S.M. pli kaj pli etendiĝas, kaj la ĉiam grava alfludo de petoj pri korespondantoj al la adreso de la prizorganto (Daniel Luez LAON - Francujo), ofte ankaŭ la troa postulemo de iuj petantoj, okazigas neeviteblajn prokrastojn en la respondoj. Tamen, ĉiuj kontentigeblaj petoj ĉiam ricevas, frue aŭ malfrue, konvenan respondon. Necesas, ke anoncu sin helpopretaj kunlaborantoj en diversaj landoj, kie estas tro malmultaj adresoj de korespondemuloj. Tiutema alvoko (en la februara n-ro de ESPERANTO) restis preskaŭ senefika (venis nur unu respondo: el Svedujo!). Baldaŭ venos la tago, kiam la tutan taskon ne povos prizorgi unu sola persono, kiel ĝis nun. La nova sistemo, kun petantoj atentantaj rektan respondon de K.S.M., kaj aliflanke kun adresdisponigantoj, donis ĝis nun bonajn rezultojn. Tamen el iuj landoj venas pli multe da koresponddeziroj, ol estas korespondpetoj rilate tiujn samajn landojn. Necesas konigi plej vaste kaj universale la ok-punktan demandaron kun invito al adresdisponigoj. Ĝis nun K.S.M. peradis milojn da adresoj.

(9) **Lingva Komisiono de U.E.A.** La Komitato en Marseille komisiis S-ron Step-Bowitz kaj d-ron Azzi rekonsideri la problemon kaj pretigi konkretan proponon kaj koncernan regularon. La Komisiitoj zorgis pri la problemoj kun helpo de s-ino Emilija Lapenna: ili raportos al la Komitato dum la Kongreso de Mainz.

(10) **Belarto.** Unu el la gravaj novaj aktivecoj de U.E.A. estas la eldono de la revuo "Belarto", kiel jara aldono al la revuo "Esperanto". La unua kajero, 72-paĝa kun multaj kontribuaj literaturaj, pri pentroarto, muziko kaj lingvistiko aperis en aprilo 1958.

IX. ZAMENHOF-JARO

Plenumante la decido de la Komitato en Marseille pri la festado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof en 1958, la Estraro ellaboris ĝeneralan provizoran planon kaj decidis komuniki ĝin al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj al la tuta esperantistaro.

La provizora plano estis publikigita en la januara numero de "Esperanto", 1958.

Samtempe komenciĝis la preparlaboroj por la formiĝo de Internacia Organiza Komitato por la festoj de la Zamenhof-Jaro (mallonge IOK). Al la landaj kaj fakaj asocioj estis sendita detala cirkulero pri la afero la 12-an de januaro 1958. La formiĝo de IOK tiom progresis, ke komence de majo estos eble publikigi la liston de ĉiuj ĝiaj membroj. La IOK havos apartan kunsidon dum la kongreso en Mainz kaj tiam ĝi povos kompletigi sin per pliaj elstaraj esperantistoj. Dum tiu kunsido la IOK akceptos ankaŭ la definitivan programon por la festoj.

Por doni kiel eble plej grandan prestiĝon al ĉiuj aranĝoj ne nur en internacia kadro, sed ankaŭ en nacia, regiona kaj loka, estos formita speciala Internacia Patrona Komitato, en kiun devus eniri tre elstaraj personoj de diversaj landoj. La formiĝo de la IPK komenciĝos tuj post la formiĝo de la IOK, tiel ke jam en Mainz oni, espereble, havos la nomojn de la unuaj membroj de la IPK.

La grandeco de ambaŭ komitatoj necesigis la kreon de speciala, malgranda Labora Komitato, kiu, laŭ la decido de la Estraro, konsistas el la ĝenerala sekretario, la direktorino de la C.O., la redaktoro de la revuo kaj la konstanta kongresa sekretario. La Labora Komitato agos laŭ la decidoj de la IOK. Intertempe ĝi prizorgas la organizon de la IOK, IPK kaj plenumas ĉiujn preparlaborojn. La Labora Komitato kunsidis en la Oficejo de CED la 4-an kaj 5-an de januaro 1958.

Evidente, sen konsiderindaj financaj rimedoj la plano ne povos esti realigita. Tial la Estraro decidis fondi specialan Fondajon-Zamenhof kaj alvoki la tutan esperantistaron abunde kontribui por tiu celo. La membroj

de la Estraro tuj kolektis inter si la komencan sumeton de 50 anglaj pundoj. Per cirkulera letero de la 30-a de januaro 1958, la komitatoj estis alvokitaj sekvi tiun ekzemplon. Aperis alvoko ankaŭ en la oficiala organo. Ĝis nun entute estas kolektita la sumo de 1200 ned. guldenoj. Ĝi estas absolute nekontentiga. Estas necese fari ĉie en la mondo kampanjon por efika kontribuo al la Fondaĵo Zamenhof kaj tiun taskon plej bone povas plenumi la membroj de la IOK, ĉiuj komitatoj de U.E.A., ĉiuj aliĝintaj asocioj, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj delegitoj. Estas necese diri tute klare, ke sen financaj rimedoj la plano ne povos esti realigita kaj la festoj, anstataŭ esti grandioza monda manifestacio de la esperantismo kaj digna omaĝo al D-ro Zamenhof, devos nepre limiĝi al malgrandaj, fermitaj aranĝetoj, sensignifaj kompare kun la grandeco de la evento.

★

★

★

X. JUNULARO

1) **Organizo.** La 12-a Internacia Junular-Kunveno en Bûsum decidis, ke TEJO, ĝis tiam memstara organizo kun proks. 600 individuaj membroj, aliĝu al UEA kiel junulara sekcio, samtempe enkondukante la principon de aŭtomata membriĝo al TEJO de ĉiuj individuaj kaj asociaj membroj de UEA ĝis 25 jaroj kaj de starigo de landaj sekcioj ĉe la Landaj Asocioj. Komitato tiucele elektita portis ĉi tiujn proponojn al la Tria Sekcio "Esperanto kaj Junularo" de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, kiu elektis sepmembran komisionon por pretigi la Statuton kaj por provizore gvidi la movadon. En la 42-a UK en Marseille la Statuto de TEJO estis prezentita al la Komitato de UEA, kiu ĝin unuanime aprobis; ĝi aperis en Jarlibro II 1957. Sekve de instigoj de la provizora estraro, energie subtenataj de la Estraro de UEA, pluraj landaj sekcioj jam fondis junularajn sekciojn. Ĝis nun ekzistas: TEJO en Brazilo; Junulara Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio; Franca Esperanto-Junularo; Germana Esperanto-Junularo; Itala Esperantista Junularo; Maroka Esperanto-Junular-Asocio; TEJO-sekcio en Nederlando; Junulara Sekcio de Sveda Esperanto-Federacio; Esperanto-Junularo de Svislando; Provizora TEJO-Komitato de ELNA; Junulara Fakto de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro; Junulara Rondo Zamenhof (Urugvajo).

2) **Agado.** TEJO kaj ĝiaj landaj sekcioj organizis plurajn junularajn renkontiĝojn. Estas citindaj: la 13-a Internacia Junular-Kunveno en Villeneuve lès-Avignon (julio 1957, 30 partoprenantoj); skiferioj de TEJO kaj de Esperanto-Junularo de Svislando (decembro 1956 kaj 1957; inter 10 kaj 20 partoprenantoj ĉiujare por ambaŭ aranĝoj); Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Mainz (50 partoprenantoj; decembro 1957; diskuttemo estis la Eŭropa unuiĝo). Junaj esperantistoj partoprenis la Festivalon en Moskvo (aŭgusto 1957; proks. 250 esperantistoj partoprenis la Esperanto-kunsidon). Estas nun organizata la 14-a IJK en Homburg. La kontaktoj kun la membroj estas garantiataj de la regula apero en "Esperanto" de junulara rubriko "La juna

vivo"; kelkaj organoj de landaj asocioj eldonas regule junularajn rubrikojn; en aliaj landoj ekzistas specialaj junularaj informiloj; la redakcio de "La juna vivo" sendas al ĉiuj esperantistaj gazetoj freŝajn informojn pri la junulara movado. Estas nun pristudata larĝa plano por kontakto kun neesperantistaj junularaj organizaĵoj.



XI. GENERALA TRARIGARDO

(1) **Literaturo.** Laŭ la Bibliografio, ellaborita de CED, en la jaroj 1956 kaj 1957 aperis entute 169 Esperanto-publikajoj. Inter ili denove troviĝis kelkaj tre gravaj verkoj. Aparte menciindaj estas la 320-paĝa "Angla Antologio" kaj la gravega dua eldono de "La Faraono" en 3 volumoj. Komence de 1958 aperis la verko "Sciencaj Studoj", redaktita de D-ro Paul Neergaard kaj eldonite de ISAE. 37 eminentaj sciencistoj aperigis en la verko siajn kontribuojn, kiuj estas rezultoj de sciencaj esploroj. ne publikigitaj pli frue. En la poezia branĉo aparte elstaran lokon okupas la "Floroj de l'Malbono" de Baude laire.

(2) **Revuoj.** Plue regule aperadas "La Nica Literatura Revuo", "Norda Prismo", "Prometeo", "La Suda Stelo", "Nuntempa Bulgario", "Internacia Pedagogia Revuo", "Scienca Revuo". En la pasinta jaro aperadis ankaŭ "Pollando", sed ekde la 1-a de januaro 1958 tiu revuo ne plu estas publikigata. Aliflanke en Soveta Unio komencis aperadi "Armena Esperantisto", tre bone redaktata de Prof. D-ro Gurgeno Sevak. Tio estas la unua presita revuo, kiu ekaperis en tiu lando post multaj jaroj. En Cinujo rekomencis aperadi en januaro 1958 la revuo "El Popola Cinio". El la malnovaj revuoj kaj gazetoj, kiuj aperadas regule dum multaj jaroj kaj daŭre publikigas ankaŭ literaturajojn, menciindaj estas "La Praktiko" (monata) kaj "Heroldo de Esperanto" (duonmonata). Maloftaj estas la lingvaj komunajoj, kiuj povas publikigi tiom da literatura kaj kulturaj revuoj, kies sola financa helpo estas la abonoj! Kiel krono sur tiu ĉi kampo venis en tiu ĉi jaro la 72-paĝa kajero de "Belarto". Pluraj landaj organoj konsiderinde pliboniĝis, ekzemple la sveda organo "La Espero" kaj "Belga Esperantisto", sed aliaj restis ankoraŭ tro modestaj. Entute nuntempe aperadas sepdeko da presitaj gazetoj kaj revuoj kaj ĉ. 50 multobligitaj bultenoj, el kiuj, tamen, pluraj estas tre interesaj laŭ la enhavo, superante iam eĉ kelkajn organojn de landaj asocioj. Speciale menciinda estas la laboro de s-ro M. Erbeta kaj de liaj kunlaborantoj, kiuj eldonas aron da kajeroj de "Grajnoj en Vento" por diversaj interlernejsaj rondoj.

(3) **Lernolibroj.** En la jaroj 1956 kaj 1957 aperis entute 22 novaj lernolibroj, kio altigas la nombron de lernolibroj por la periodo 1945-1957 al 113. Lernolibroj de Esperanto aperis en 1956 kaj 1957 por la lingvoj: angla, bulgara, hispana, indonezia, islanda, itala, japana, norvega, portugala, rusa, slovena kaj sveda. En la sama periodo aperis 11 novaj terminaroj kaj vortaroj, el kiuj speciale menciindaj estas "Scienca kaj Teknika Terminaro" de Rudolf Haferkorn kaj Kurt Dellian en kunlaboro kun F. J. Belinfante, kaj la granda vortaro Esperanta-Franca de G. Waringhien. Al tiuj lernolibroj kaj vortaroj aldoniĝas deko da legolibroj kaj pluraj lingvistikaj verkoj kaj studoj.

(4) **Radio.** En 1957 estis entute 1250 elsendoj, kiuj daŭris kune 317 horojn. Kompare kun 1956 la nombro de elsendoj malgrandiĝis je 178, kio ŝuldiĝas al la fakto, ke pluraj radio-stacioj, aŭdeblaj nur loke, ĉesigis siajn elsendojn. Sed aliflanke gravaj radio-stacioj, aŭdeblaj sur vastaj teritorioj, aŭ enkondukis Esperanto-elsendojn aŭ plilongigis siajn programojn. Al tiuj apartenas Romo, Rio de Janeiro kaj Sofio. La esperantistaro devus dediĉi pli da atento al la radio-stacioj, kiuj elsendas en la Internacia Lingvo.

(4) **Resumoj.** Dudeko da sciencaj kaj fakaj revuoj aldonas resumojn en Esperanto. La preciza nombro ne estas konata.

(5) **Trafiko kaj Komercio.** Denove aperis kontentiga nombro da prospektoj pri diversaj urboj kaj regionoj. En la du pasintaj jaroj aperis 28 tiaj prospektoj, tiel ke en la periodo 1945-1957 entute aperis 243 prospektoj kun turisma karaktero. Ili estas eldonataj, kompreneble, de neesperantistaj organizaĵoj kaj institucioj.

(6) **Aliaj Esperanto-organizaĵoj.** La plej grava el la organizaĵoj ekster la kadro de UEA estas SAT. Ĝi regule eldonas sian monatan organon kaj ankaŭ la revuon "Sennacieca Revuo" unu fojon en la jaro. La ĉiujaran kongreson de SAT ĉeestas kutime inter 600-1000 personoj.

XII. KONKLUDO

Tute certe la Esperantismo faris ankaŭ en la pasinta laborjaro plian paŝon antaŭen. Se oni ĵetas rapidan rigardon sur la diversajn mondopartojn, oni facile konstatas, ke Okcidenta Eŭropo estas ankoraŭ la ĉefa kolono de la Movado. Generale en Okcidenta Eŭropo, en Aŭstralio, Novzelando kaj kelkaj aliaj regionoj la pozicioj estas konservitaj, kelkloke iom plibonigitaj, precipe en Italujo. El Orienteŭropaj landoj la plej bonajn progresojn montras Pollando kaj Jugoslavio. En tiu lasta aperas 5 Esperanto-revuoj presitaj, kio sendube estas rekordo en la mondo. En Soveta Unio la interesiĝo estas daŭre tre granda, ekzistas pluraj societoj kaj grupoj, eĉ en tre gravaj lokoj (ekzemple ĉe la Granda Soveta Enciklopedio kaj en la Instituto de Lingvoscienco), sed ne formiĝis tutlanda asocio. En Azio la plej forta movado estas en Japanujo, kiun lastatempe komencis sekvi Ĉinujo kaj Indonezio. La laboro de T. Sekelj rezultigis kernon de movado en Hindujo. En Afriko la sola organizita movado troviĝas en Maroko. En Suda Ameriko bonege funkcias la brazila asocio, kiu estas la plej forta el ĉiuj sud-amerikaj kaj unu el la plej fortaj en la mondo. Sekvas Urugvajo kaj Argentino. En la nemenciitaj landoj kaj regionoj de Afriko, Azio kaj Suda Ameriko la tieaj esperantistoj devus tre serioze pripensi la eblecon krei landajn organizaĵojn, ĉar nur per organizita laboro oni povas iri antaŭen.

Kelkaj el la fakaj internaciaj organizaĵoj laboras tre kontentige, sed ĝenerale estas rimarkebla manko de kontaktoj kun la samfakaj neesperantistaj organizaĵoj. Tio kaŭzas, ke la laboro de la Esperantaj fakaj organizaĵoj ne estas rimarkata, aŭ almenaŭ ne sufiĉe rimarkata en la koncernaj fakaj medioj. La problemo de ĉiuj niaj organizaĵoj kaj tute speciale de la fakaj estas eliri el la ŝeloj de izoliteco kaj multe pli vaste ol ĝis nun ligiĝi al samfakaj kaj ĝenerale kulturaj medioj. UEA klopodas tiurilate montri la vojon en kadroj mondaj. La ĉefa tasko de niaj landaj kaj fakaj organizaĵoj estas sekvi tiun vojon en kadroj landaj kaj fakaj. Venki favore al la Internacia Lingvo la ŝlosilajn poziciojn de la kulturo

signifas tute certe unu el la plej esencaj antaŭkondiĉoj por la plua, multe pli ampleksa progresado.

Prof. D-ro G. Canuto
Prezidanto

Prof. D-ro Ivo Lapenna
Ĝenerala Sekretario



RAPORTO PRI LA AGADO

de la

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

por la periodo inter 1-IV-1957 kaj 1-IV-1958

A. ORGANIZAJ DEMANDOJ

(1) **Oficejo.** La oficejo de CED estas nun konvene lokigita en 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, 15 minutojn de la centro de Londono. La oficejo konsistas el unu ĉambro kaj el ĉambreto kiel deponejo. Ĝi havas la necesan oficejan ilaron. Car nun ankaŭ la C.O. en Rotterdam posedas diktafonon de la sama tipo (Stenorette), en pluraj okazoj estis eble tutsimple sendi bendon kun la registritaj komunikoj anstataŭ skribi leteron. En pluraj kazoj tio montrigis tre utila.

(2) **Kunlaborantoj.** Krom la direktoro kaj la sekretario, CED nun havas 86 kunlaborantojn el 21 landoj. Ĉiuj kunlaborantoj ĉiam plenumis la laborojn, kiujn ili prenis interkonsente kun la direktoro. En la 6-jara funkciado de CED neniam okazis, ke iu kunlaboranto rifuzus iun taskon aŭ ne plenumus ĝin ĝustatempe, krom en kazoj de malsano aŭ simila malhelpo.

(3) **Kunveno en Grésillon.** La 21-an de julio 1957 okazis kunveno de kelkaj kunlaborantoj en Grésillon. Ĉeestis D-ro Albault, Mag. Auld, D-ro Roelofs, Ing. Watier, Prof. Waringhien, Prof. Lapenna. La direktoro donis mallongan raporton pri la agado de CED kaj pri ĝia interna funkciado. En la diskuto estis faritaj pluraj sugestoj, precipe rilate la pli vastan utiligon de la dokumentoj de CED. La ĉeestintoj esprimis la opinion, ke la nuna organizformo estas tre taŭga kaj sekve ne sugestis iun ajn ŝanĝon tiurilate.

(4) **Financa Situacio.** Aliloke estas prezentita la financa raporto de CED. Ĉi tie estas utile atentigi, ke en la pasinta kalendara jaro kelkaj Esperanto-organizaĵoj kaj pluraj unuopuloj entute donacis al CED £ 186-9-0.

Kvarono de tiu sumo estis kolektita dum la U.K. en Marseille. La financaj rimedoj, pri kiuj disponas CED, estas vere minimumaj. Tute certe estus eble kolekti konsiderinde pli grandajn sumojn kiel donacojn, se en la lokaj grupoj almenaŭ unufoje en la jaro unu el la membroj, kiu komprenas la gravecon de CED por la Esperanto-Movado, atentigus la membraron pri la laboro kaj bezonoj de CED.

B. PLENUMITAJ LABOROJ

Agante laŭ speciala laborplano, kiun ĉiujare aprobas la Komitato, CED plenumis en la pasinta laborperiodo jenajn taskojn:

(1) **Dokumenta materialo.** Ĝis la 1-a de aprilo 1958 estas entute kolektitaj, ordigitaj kaj registritaj 1170 dokumentoj pri Esperanto kaj ĝenerale pri la lingva problemoj en la internaciaj rilatoj. En la oficejo de CED estas legataj ankaŭ ĉiuj pli gravaj Esperanto-gazetoj kaj pluraj naciolingvaj revuoj pri lingvistikaj problemoj. Ĉiuj informoj kaj artikoloj, kiuj povas esti utilaj por la laboroj de CED, estas same tiel sisteme notataj.

(2) **CED-Dokumentoj.** La eldonado de dokumentoj estis daŭrigita kaj aperis pluraj novaj dokumentoj laŭ la plano starigita en la jaro 1952. Ĝis nun CED publikigis entute 90 dokumentojn. Ili estas sendataj nun al 170 organizaĵoj kaj institucioj en 68 landoj. Ilin ricevas ankaŭ la UNESKO-Komisionoj de diversaj landoj. Kelkaj dokumentoj aperis ne nur en la angla kaj en la franca, sed ankaŭ en aliaj lingvoj.

(3) **Dokumento CED/5 en 7 Lingvoj.** Okaze de la 70-jara datreveno de la apero de la verko "Internacia Lingvo", CED publikigis specialan dokumenton CED/5 kun la titolo "Sepdek Jaroj de la Internacia Lingvo". Tiu dokumento prezentis en 12 mallongaj ĉapitroj la ĉefajn atingojn kaj la nunan staton de Esperanto en la mondo. Krom en Esperanto, tiu dokumento estis publikigita en la angla (du eldonoj), franca, germana, nederlanda, pola kaj sveda lingvoj. Ĝi ankaŭ aperis en unu nederlanda gazeto. Daŭre dum la tuta jaro ĝin mendis diversaj

bibliotekoj, librovendejoj kaj privatuloj precipe en Britujo, Francujo, Italujo, Usono kaj Soveta Unio.

(4) **Universala Ekspozicio.** La 4-a elmonro de la Universala Ekspozicio estos en Mainz okaze de la U.K. La komisiito de CED por la organizo de la ekspozicio en Mainz estas s-ro Leo Jolliet.

(5) **Bibliografio.** Mag. W. Auld, kunlaboranto de CED, finis la Kvaran Aldonon al Bibliografio de la Internacia Lingvo. Tiu ĉi aldono rilatas al la jaroj 1956-1957. Ĝi enhavas 169 erojn. Tiamaniere CED posedas kompletan Bibliografion por la jaroj 1945-1957, kun entute 1.072 eroj. Detaloj en la maja numero de "Esperanto", 1958. Mag. W. Auld kompletigas sian Bibliografion por la jaroj 1929-1945 kaj esperas fini tiun grandan kaj gravan laboron ĝis decembro 1958, tiel ke en la jubilea jaro (1959) CED povos eldoni kompletan Bibliografion de la Internacia Lingvo, se nur la financaj rimedoj tion premosas.

(6) **Index Translationum.** Mag. W. Auld faris ankaŭ novan liston de Esperantlingvaj tradukoj por la grava verko Index Translationum, eldonata de UNESKO. Tiu aldono rilatas al la jaroj 1956 kaj 1957. La materialo estas sendita en marto 1958 al la redakcio de Index Translationum.

(7) **Denaskaj Esperantistoj.** La kunlaborantino de CED f-ino Sirkku Koivu el Helsinko finis la enketon pri la esperantistaj infanoj kaj pri ĉiuj denaskaj esperantistoj. La rezultoj de tiu enketo estas koncize prezentitaj en la decembra numero de "Esperanto", 1957, p. 184. La rezultoj de la enketo, per si mem tre interesaj, certe povos esti utiligitaj kiel solida bazo por pliaj studoj.

(8) **Radio-Elsendoj.** Laŭ la statistiko, farita de s-ro G. Larglantier, kunlaboranto de CED por la fako radio, en la jaro 1957 estis entute 1.250 Esperantaj radioelsendoj, kiuj kune daŭris precize 317 horojn. Detaloj en la maja numero de "Esperanto" 1958.

(9) **Esperantaj Libroj en Publika Biblioteko.** Mag. F. Winkel, kunlaboranto de CED pri tiu demando, finis sian enketon kaj prezentis al CED ampleksan raporton pri la Esperanto-libroj en la bibliotekoj de Norvegujo,

Svedujo, Finnlando, Portugalujo, Meksiko, Hispanujo, Aŭstrujo. Resumaj ciferoj pri tiu abunda materialo estos publikigitaj en unu el la sekvantaj numeroj de "Esperanto".

(10) **Eminentaj Esperantistoj.** En tiu ĉi jaro CED entreprenis novan enketon kun la celo registri ĉiujn eminentajn personojn, precipe sur la kampo de scienco kaj kulturo ĝenerale, kiuj ne nur formale apogis per siaj deklaroj Esperanton, sed ankaŭ sciis kaj scias la lingvon. Tiun taskon prenis la kunlaborantino de CED pri statistikaj demandoj, s-ino Emilija Lapenna. La demandfolioj estos ekspeditaj en aprilo 1958 kaj la enketo estos finita ĝis la 1-a de januaro 1959.

(11) **Ekonomiaj Malavantaĝoj de Multlingveco.** Tiu laboro ankoraŭ ne estas finita. Estas jam kolektitaj tre utiliaj dokumentoj, informoj kaj aliaj materialoj, sed la bildo ne estas kompleta. Estas renkontataj pluraj malfacilaĵoj precipe tial, ĉar gravaj organizaĵoj aŭ ne havas precizajn informojn pri la kostoj, kiujn kaŭzas la utiligo de pluraj naciaj lingvoj, aŭ tre nevolonte donas tiujn informojn.

(12) **Traktaĵo de D-ro Wajsbium.** CED pere de kelkaj siaj kunlaborantoj, ĉefe pere de D-ro M. Wajsbium, daŭre sekvas ĉiujn novaĵojn sur la kampo de diversaj projektoj, planoj kaj klopodoj por solvi la problemon de komuna lingvo en internaciaj rilatoj. Kiam ajn estas necese, CED reagas en taŭga formo. La traktaĵo de D-ro Wajsbium pri tiu demando ne povis esti finita pro tre grava malsaniĝo de la aŭtoro. CED deziras al sia eminenta kunlaboranto baldaŭn kompletan resaniĝon kaj reakiron de la fortoj.

(13) **Konferenco pri Scienca kaj Teknika Tradukado.** CED estis invitita partopreni en la laboroj de tiu konferenco, kiu okazis en Londono la 5-an de marto 1958 sub la prezido de D-ro J. E. Holmstrom. La bazo de la diversaj raportoj kaj de la diskuto estis la verko de D-ro Holmstrom "Scientific and Technical Translating" (Scienca kaj Teknika Tradukado), publikigita de UNESKO en la jaro 1957. En tiu verko troviĝis pluraj gravaj eraroj rilate Esperanton. Tial CED, laŭ la peto de D-ro

Holmstrom, sendis jam pli frue ampleksan kritikan raporton. En sia letero de la 12-a de novembro 1957, skribita en Esperanto, D-ro Holmstrom estis dankinta pro la helpo kaj eksplicite promesinta, ke en la sekvanta eldono ĉiuj eraroj estos korektitaj. La samon li ripetis al la direktoro de CED persone okaze de la konferenco. Konsiderante tiun fakton, kiel ankaŭ la tre mallongan tempon je dispono de la ĉeestintoj por diskuto (proksimume 3/4 de horo) la direktoro de CED ne opiniis necesa partopreni en la diskuto. Lia ĉeesto tamen estis tre utila ne nur pro la personaj kontaktoj, sed ankaŭ pro la tre interesaj problemoj, diskutitaj en la konferenco, kaj pro la objektivaj informoj pri la multnombraj malfacilaĵoj — ankaŭ financaj — kiujn frontas la teknika tradukado.

(14) **Raportoj.** Mallongaj raportoj kaj informoj pri la diversaj aktivecoj de CED regule aperadis en la organo de U.E.A.

C. LABORPLANO POR 1958/1959

(1) **Kunlaborantoj.** Revizii la liston de kunlaborantoj kun la celo havigi pliajn kvalifikitajn specialistojn, kiuj estas pretaj efektive kunlabori kaj kontribui al la celoj de CED.

(2) **Dokumenta Materialo.** Daŭrigi la kolektadon kaj registradon de ĉiuj gravaj dokumentoj, kun speciala atento al ĉio, kio rilatas la vivon kaj laboron de D-ro L. L. Zamenhof.

(3) **Eldonado de Dokumentoj.** Daŭrigi la regulan eldonadon de dokumentoj proksimume 4-foje monate.

(4) **Bibliografio.** Pretigi la Bibliografion por 1958. Fini la jam komencitan Bibliografion por la periodo 1929-1945 kaj eldoni en la Jubilea Jaro, se la financaj rimedoj tion permesos, la verkon "Bibliografio de la Internacia Lingvo".

(5) **Radio.** Enketo pri la elsendoj en 1958 kaj eldono de speciala dokumento pri ĉiuj Esperanto-elsendoj.

(6) **Ekonomiaj Malavantaĝoj de Multlingveco.** Daŭrigi kaj kompletigi la jam faritan laboron, tiel ke, laŭ la ebleco, en la Jubilea Jaro estu eldonita speciala dokumento pri tiu demando.

(7) **Zamenhof.** Eldono de aparta dokumento kun koncizaj informoj pri la vivo kaj verko de Zamenhof, kaj prizorgo, ke tiu dokumento estu publikigita en kiel eble plej multe da naciaj lingvoj.

(8) **Ĝisdatigo de la Dok. CED/5.** Ĝisdatigi la dokumenton CED/5 kaj eldoni ĝin en tiel kompletigita formo en kiel eble plej multe da naciaj lingvoj en la Jubilea Jaro.

(9) **Artikoloj Zamenhof.** Kompetentaj kunlaborantoj de CED verkos artikolojn pri Zamenhof kaj lia laboro. Tiuj artikoloj estos sendataj dum la tuta jaro 1959 al la kunlaborantoj de CED kaj de la I.F. de U.E.A. kaj de la landaj asocioj por publikigo en la naciaj lingvoj.

(10) **Zamenhof-Jaro.** Doni ĉian eblan helpon, en la kadro de la laboroj kaj taskoj de CED, al la Internacia Organiza Komitato por la festoj de la Zamenhof-Jaro.

(11) **Eminentaj Esperantistoj.** Fini la enketon ĝis la 1-a de januaro 1959, kaj eldoni specialan dokumenton en Esperanto.

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Direktoro de CED.

ALDONO

Raportoj de Landaj, Neneŭtralaj kaj Fakaj Asocioj

La sekvantaj notoj estas kompilitaj de raportoj de la koncernitaj organizaĵoj. La telegrafa stilo ofte forrabas la entuziasmigajn sentojn de la originalaj raportoj. Do bonvole legu "inter la linioj" ke raportita fakto estas ofte loka triumfo.

I ALIGINTAJ ASOCIOJ

1) **Argentino.** La Argentina Esperanto Ligo. Membraro 250 organizitaj en 8 grupoj, kiuj ĉiuj okazigis kursojn. La informa fakto sendis cirkuleron ĉiun duan monaton al la plej gravaj ĵurnaloj de la lando. En la urbo Rafaela estis inaŭgurita strato "Dr. L. Zamenhof, Iniciador del Esperanto".

2) **Belgujo.** Reĝa Belga Ligo Esperantista. La aliĝintoj estas 462, organizitaj en 7 grupoj. La grupoj organizas kursojn unu el kiuj okazis en Reĝa Ateneo kun 25 studentoj. 35 artikoloj aperis en Belgaj gazetoj — nur unu malfavora. La nacia organo, "Belga Esperantisto" aperis 7 foje en 500 ekz. Komuna kongreso kun Nederlanda kaj Flandra Ligoj okazis en Eindhoven, Nederlando, kun 200 partoprenantoj. La Belga Esperanto-Instituto ankoraŭ bone funkcias.

3) **Brazilo.** Brazilia Esperanto-Ligo. Membraro 2890 (2590 en 1956) kun 40 filiitaj institucioj. Fondiĝis asocioj en urboj kiaj Teresina (Piaul) kaj Campos. La veterana Brazilia Klubo "Esperanto" meritplene agas de sia fondiĝo en 1906. Esperanto-kursoj estas starigitaj en fakultatoj de Filozofio, en universitatoj de Salvador kaj Sao Paulo. La urba registaro en Sao Paulo disponigas al la Klubo oficialan sidejon kie funkcias oficiala kurso. Lernejo de interpretistoj en Belo Horizonte enkondukis Esperanton. En Belo Horizonte oni inaŭguris belan Esperanto-Monumenton, ankaŭ tie ekzistas Zamenhof-Monumento kun busto skulptita de fama brazilano. En Rio de Janeiro, tri radiostacioj disaŭdigas regulan Esperanto-programon kaj ankaŭ kelkajn televidajn programojn. En aliaj urboj ofte estis dissenditaj informoj aŭ paroladoj.

La klubo en Caratinga, Minas Gerais, kolektis moveblan ekspozicion kiu estis transportita al diversaj urboj.

Kelkaj gazetoj en Recife, Maceio, Salvador k.a. aperigas konstantan Esperanto-rubrikon. La Ligo kaj presagentejoj dissendas artikolojn kiuj estas legataj tra la tuta lando.

Plenumo al la Liga programo por publikigi librojn, aperis "Teatro" de famkonata brazila verkisto, Machado de Assis, kaj la 6a eldono de Esperanto-Kurso en 20 lecionoj pro kio jam fariĝas kelkmiloj de esperantistoj. Oni riĉigas la jam tre grandan bibliotekon de la Ligo. Okazis tutlandaj kaj regionaj kongresoj. La Ligo instigas lernantojn akiri diplomojn kaj donacos parton de la sumo tiel ricevita al la Akademio de Esperanto.

4) **Britujo.** Brita Esperantista Asocio. En la frua parto de 1957 la internacia politika krizo — en kiu Britujo ludis gravan rolon — malfavore influis la evoluon de internaciaj ligiloj, do ankaŭ de Esperanto. Malgraŭ tio la multjara kaj persista propagando portis frukton, kaj je fino de la jaro la nombro de kotiz-pagantaj membroj iom kreskis, ĝis 1471.

La 57 grupoj, kunligitaj en 12 Regionaj Federacioj daŭre laboris, kaj multaj grupoj raportis kontentigajn sukcesojn.

La instruo de Esperanto en pluraj lernejoj altiris la atenton de gravaj gazetoj kaj de la B.B.C.

Ankoraŭfoje, B.E.A. reklamis en popularaj gazetoj je kosto de £ 264 kaj, rezulte, vendis pli ol 300 korespondajn kursojn.

En la centra oficejo de B.E.A. oni ricevis dum la jaro 10,405 leterojn kaj 480 gazet-eltranĉaĵojn pri Esperanto. Oni vendis librojn je valoro de £ 1,703.

"The British Esperantist", monata revuo, aperis regule, sub redaktado de S-ro C. C. Goldsmith, kaj ricevis bonegan akcepton, ne nur en Britujo, sed ankaŭ eksterlande.

La Brita Kongreso en Weston-super-Mare, je Pasko bone sukcesis, kaj 200 ĉeestis.

Entute ni rajtas pretendi ke, en Britujo, Esperanto faris definitivan paŝon antaŭen dum 1957.

5) **Bulgarujo.** Bulgara Esperantista Asocio. Senĉese plivastiĝas la Esperanto-movado. Loka Esperantaj socie-

toj nombras 63 (44, 1956), 49 urbaj, 14 vilaĝaj. Aktive funkcias 8 sekcioj: Fervojista, ĵurnalista, instruista, poŝtista, junulara, blindula, medicinista kaj laborantoj kinaj.

Okazis 5 distriktaĵaj konferencoj ampleksante la tutan landon el kiuj rezultis pligranda intereso de la publiko kaj de ŝtataj, partiaj kaj sociaj instancoj.

Okaze de la 70a datreveno de Esperanto kaj la 50a datreveno de la fondiĝo de Bulgara Esperantista Asocio, en Sofio kaj en la tuta lando la lokaj societaj organizis solenaĵajn jubileajn kunvenoĵn partoprenitajn de miloj da amikoj kaj simpatiantoj de Esperanto. La Asocio eldonis 5,000 ekz. de bela artistaj afiŝoj pri la jubileoĵ, kaj jubilean gazeton "Esperanto" en bulgara lingvo en 15,000 ekz.

La poŝtdirekcio eldonis jubilean esperantan poŝtmarkon, kaj la solenaĵoj estis filmitaj kaj montritaj en kinejoj. La gazetaro publikigis multajn artikolojn, kaj radiostacioĵ elsendis pri ĝi.

Tre bonvena estas la nova "Nuntempa Bulgario" eldonita en 9,000 ekz., kaj varme akceptita en 50 landoj.

Ekkomencis en Junio regulaj 25-minutaj disaŭdigoĵ en Esperanto, ĉiudimanche, de Radio Sofio.

Pli ol 1,300 kursanoĵ partoprenis korespondan kurson organizitan de ŝtata komerca entrepreno.

La ŝtata turisma entrepreno "Balkanturist" eldonis dekon da belegaj ilustritaj prospektoj kun teksto en Esperanto.

6) **Danlando.** Centra Dana Esperantista Ligo. La Ligo havas 36 klubojn kaj 1,639 membrojn. Pro atenta prizorgo pli boniĝis la ekonomio Liga, kaj la kasenhavo forte kreskas. La Ligo enkondukis sistemon de Subtenantoĵ kiuj nombras 56 kaj pagas 15 kronojn jare pro propagandaj celoj. La gazeto "Dansk Esperanto-Blad" aperis en 1,200 ekz. La kursoĵ montris kreskon. Du eksterlandaj Ĉe-instruistoj estis dungataj. La nacia kongreso okazis en Aarhus. La reorganizita gazetara servo registris 600 artikolojn pri Esperanto. La Ligo elsendis duan eldonon de propagandbroŝuro en 10,000 ekz. kaj eldonis propagandafiŝon. Pluraj eksterlandaj prelegantoĵ vizitis Danlandon. La Ligo sendis helpon al Hungaraj samideanoĵ de 4,000 kronoj.

7) **Franco.** Unuiĝo Esperantista Franca. Dum la U.K. en Marseille okazis la jara kunveno de U.E.F. kie estis elektita S-ro René Liech-Walter, prezidanto kaj S-ro Philippe, honora Prezidanto. La membraro estis 2136 (2093 dum 1956).

Ĉe la internacia konkurso de U.E.A. Franco havas la kvaran pozicion kaj la plej grandan nombron de membroĵ- abonantoĵ.

S-roĵ Liech-Walter, Petit kaj Ribot faris 31 prelegojn. Okazis 180 radioprelegoj kaj 10 ekspozicioĵ kun 5,000 vizitantoĵ. Estis disdonataj 10,000 afiŝoj, flugfolioĵ kaj prospektoj. Propaganda budo funkciis en la Foiro de Parizo.

Peticio por enkonduko de esperanto en la abiturientaj ekzamenoĵ, laŭ la iniciato de André Ribot, ricevis la subskribojn de 160,000 personoj inter ili 6 rektoroĵ, 6 Akademiaj Inspektoroĵ, 50 Deputitoĵ kaj senatanoĵ, 100 agregaciaj profesoroĵ kaj 8,000 membroĵ de la Edukado. Sub prezido de Pierre Petit, okazis en Palaco de UNESKO la unua internacia kongreso de Popolaj Universitatoĵ kie, por la unua fojo en la mondo, dum neesperantista kongreso, la sola lingvo de tradukado estis Esperanto.

Robert Gendre redaktas la monatan gazeton "Franca esperantisto" kiu fariĝas tre interesa revuo dank' al kunlaborado de D-ro Albault, Jack Rousseau, Thierry, Duc Goninaz, Ciliga, Royer, Muller, Leger, Luez ktp.

8) **Germanujo.** "Germana Esperanto-Revuo", la oficiala organo de Germana Esperanto-Asocio (G.E.A.), aperis ĉiunonate kun 12 paĝoj (eldonkvanto 3300 ekz.).

G.E.A. eldonis germanan tradukon de la broŝuro "Sepdek jaroĵ de Internacia Lingvo" de D-ro Lapenna kaj kvarlingvan varbfolion "Naŭ tezoĵ pri la eŭropa lingvoproblemo" de D-ro Herrmann.

En 1957 la gazetara servo dissendis 15 informilojn (20 paĝoj) kun entute 2230 ekzempleroĵ kaj kolektis 995 gazetarajn publikigojn pri Esperanto. La radio-servo konstatis 16 radio-intervjuojn aŭ -informojn pri Esperanto.

La grupoĵ kaj ligoĵ disdonis en 1957 proksimume 40000 propagandilojn kaj aranĝis 70 prelegojn kun 3000 kaj 30

ekspoziciojn kun 8000 personoj. Tre sukcesa estis la prelegvojaĝo de la japana ĵurnalistino s-ino Joŝiko Kajino.

La Jarkunveno 1957 de G.E.A. okazis en Mainz, la urbo de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto. G.E.A. subtenis la esperantistojn en orienta Germanujo per granda nombro da lernolibroj kaj vortaroj.

Germana Esperanto-Junularo funkciigas korespondan servon kaj organizis kun ŝtata subvencio internaciajn junularkunvenojn en Berlin, sur Feidberg (Nigra Arbaro) kaj en Mainz.

Germana Esperanto-Instituto, kiu ricevis subvenciojn de la magistrata sekcio por instruaj aferoj de la urbo Munkeno, okazigis 5 ekzamenojn kun 28 kandidatoj en diversaj kategorioj.

9) **Hispanujo.** Hispana Esperanto-Federacio. La Federacio ne centrigas aferojn kaj la grupoj laboras aŭtonome por disvastigi la lingvon. La ĉefa celo estas atingi favoran medion. Lokaj grupoj aranĝas kursojn kaj la Federacio korespondan kurson. Nova kurso funkcias ĉe la Nacia Sindikato-Oficejo. Regule aperas "Boletín" la nacia organo. En Madrid okazis tri prelegoj ĉe la Altsupera Instituto pri Sciencaj Studoj, kaj ekspozicio pri UNESKO.

10) **Italujo.** Itala Esperanto Federacio. Membraro 1677. Grupoj 50. Kursoj 60, plus 31 en lernejoj. 323 gelnantoj sukcesis en ekzamenoj. 37 gajnis rajtigilon instrui Esperanton. Multaj memlernantoj kontaktis la centran sidejon de la Instituto Itala.

La gazetara fako havas sesdekon da kunlaborantoj. Aperis 1,100 artikoloj kaj sciigoj, 95% favoraj. Diversaj novaĵagentoj kaj gazetoj konsentis publikigi regulan informon. Fremdaj esperantistoj ofte prelegis en la grupoj kaj al neesperantistoj; pliigis la kvanto de mon-trofenestroj; gravaj ekspozicioj estis aranĝataj, ekzemple "Unua Monda Ekspozicio pri la Esperanto Preso" organizita de la grupo en Milano kaj "La Unua Konferenco de Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo" kiu interesigis multajn Italajn komerc-Cambrojn. Bonege sukcesis la aranĝoj pri la Tago de UNO kaj pri la "Tago de Homaj Rajtoj" planitaj de U.E.A.

11) **Jugoslavio.** Jugoslavia Esperanto-Federacio konsistas el ses landaj ligoj el Kroatio, Slovenio, Serbio, Bosnio kaj Hercegovino, Vojvodino kaj Makedonio. La Makedonia Esperanto-Ligo estis fondita dum 1957.

Oni taksas la nombron de esperantistoj en la lando je 7,000 el kiuj nur 2,000, pro devizaj malfacilaĵoj, povas esti anoncita al U.E.A.

La fakaj asocioj de fervojistoj kaj medicinistoj ankoraŭ funkcias, kaj estis fonditaj en 1957 asocioj de pedagogoj, tradukistoj esperantistaj, kaj por la junularo.

Dum 1957, "La Suda Stelo" fariĝis socia kultura kaj literatura revuo, kaj nova monata gazeto aperis "Jugoslavia Esperantisto", la oficiala organo de JEF. Ankaŭ regule aperas "Jugoslavia Fervojisto" kaj fondiĝis "La Progreso" monata junulara gazeto.

Dum somero 1957 okazis, sub aŭspicio de Jugoslavia Nacia UNESKO-komisiono, Somera Pedagogia Semajno en Kranjska Gora. Partoprenis eminentaj enlandaj kaj allandaj prelegantoj. Ĉeestis la seminarion 80 profesiaj instruistoj kaj instruantoj kiuj ricevis diplomojn.

Post tio, JEF aranĝis en Radovljica seminarion por junularaj gvidantoj, kiun partoprenis 27 gejunuloj. Okazis proksimume 150 E. kursoj kun 2,300 partoprenantoj. En Zagreb, Esperanto estis instruata en la Ekonomia Fakultato. Oni plivastigis la instruadon en la lernejoj, (proksimume 70). Esperantlingvaj 20-minutaj ĵaŭdaj elsendoj de Radio Zagreb daŭre okazas.

En somero 1957 okazis en Ljubljana gravaj traktadoj inter JEF kaj Asocio de Esperantistoj en Pollando pri la rolo de U.E.A. kaj aliaj E. organizoj, pri koordinado de lerneja kampanjo kaj eduko de nova generacio, pri la rolo de internaciaj E. kongresoj kaj la kristaliĝinta unueca vidpunkto estis esprimita en komuna deklaro.

Por alligi amason da moralaj apogantoj al nia afero, JEF entreprenis kampanjon por varbado de Amikoj de la Internacia Lingvo, kiu konstante daŭras. JEF entreprenis enketadon de ekzistantaj esperantistoj kaj sukcesis ĝis nun kolekti 7,000 enketfoliojn.

12) **Nederlando.** La Nederlanda Esperantista Asocio "La Estonteco estas Nia" havas 1016 membrojn kaj 30 sekciojn. La Asocio havas skribajn kursojn por elementa, meza kaj

supera diplomoj. La sekcioj ankaŭ havas kursojn. En Nederlando ekzistas la oficejo "Esperanto ĉe la Instruado", kiu precipe prizorgas informadon pri Esperanto inter geinstruistoj. La Asocio havas specialan propagandan komitaton kaj gazetarservon. Kelkaj sekcioj aranĝis prelegojn de eksterlandanoj kaj tri ekspoziciojn pri Esperanto. La C.E.D./5 cirkulero pri la 70-jara jubileo de Esperanto estis eldonita en Nederlanda lingvo, kaj same la 9 tezoj de D-ro Herrmann. La prezidanto havis radio-intervjuon pri la utilo de Esperanto.

13) **Norvegujo.** La Norvega Esperantista Ligo raportas ke la intereso por Esperanto ŝajnas esti kreskanta en plej multaj lokoj en la lando. La Ligo scias pri 8,680 esperantistoj en 609 lokoj en la lando. Ĝia membraro estas 812 kiu konsistas el la membroj de 25 kluboj kaj rekte aliĝintoj. La laboro estas tre efike organizita por ke ĝi povu esti dividita inter volontuloj. La Ligo ricevis 1626 leterojn kaj 1219 presajojn kaj sendis 1517 leterojn kaj 3806 presajojn.

Okazis 279 klubkunvenoj kun meznombra ĉeesto de 57 kaj 16 studrondoj kun 115 membroj. 114 klubmembroj partoprenis elementan ekzamenon, 51 superan kaj 2 instruistoj. La kluboj festis la tagojn de UNO kaj Homaj Rajtoj.

S-ro Zelko Takaĉ el Jugoslavio faris prelegvojaĝon kaj printempan kaj aŭtunan kursojn. Lokaj instruistoj faris pli ol 16 diversgradajn kursojn kun 25 lernantoj. 116 personoj partoprenis leterajn kursojn. Propagandaj kafejoj estis venditaj kaj ĉiu kursano ricevis faldajn bonvenigojn al la movado. Estis ricevita 800 eltranĉaĵoj el gazetoj aparte pri la 70-jara jubileo de Esperanto. Okazis kelkaj disaŭdigoj per radio. S-ro B. Potts el Nov-Zelando prelegis en kelkaj kluboj. Komisiono estis fondita por la "Lerneja kampanjo" de U.E.A. La flugfolio de U.E.A. estis disdonita en pluraj neesperantaj kongresoj kaj dokumento CED/4 tradukita en norvegan lingvon. Funkcias blindula, skolita kaj instruista fakoj.

14) **Pollando.** La Asocio de esperantistoj en Pollando havas 3,500 membrojn, 30 filiojn kaj vigan junularan sektion. La delegita reto de U.E.A. ĉiam plivastigas.

Elstara estas la eldonprogramo:

1) Ree aperas la mainova organo "Pola Esperantisto" presita dumonate 60 paĝoj 2,500 ekz. nur en Esperanto.

2) Pollingva ĵurnalformata 8 paĝa ilustrita libreto pri Esperanto disvendigis en 18,000 ekz.

3) La ŝtata eldonejo kontinuigis eldoni sian oficialan organon "Pollando" en 3,500 ekz. sur 32 paĝoj monate. La Asocio disvendis 16427 ekz. kaj la resto estis distribuata senpere per la ŝtato.

La jenaj libroj estis eldonitaj de la Asocio: 10,000 ekz de "70 jaroj de Esperanto" de Prof. Lapenna. 7,500 ekz de la Lernolibro de Esperanto de Turno.

7,500 ekz de la pol-esp. kaj esp-pola Vortareto de Turno. 6,000 ekz de la "Plena Fundamenta Vortaro" esp.-pola de J. Zawada.

4,000 ekz de la novelaro "Medallonoj" de Zofia Nalkowska.

3,000 ekz de la novelo de Eliza Orzeszkowa "A.B.C." kiel legolibro por progresintoj.

2,000 ekz de la Pola-Esperanto Vortaro de Guterman Mieczyslaw.

500 ekz de la Pola-Esper. Vortaro de Antonio Grabowski (multobligita. La Pola ŝtato eldonis).

15,000 ekz de la lernolibro "1000 Stow Esperanto" (Mil vortoj de Esperanto) de Edmund kaj Jan Fethke.

7,000 ekz de la verko de Boleslaw Prus, "La Faraono" en 3 volumoj, bele binditaj.

Kursoj.

a) Ĉirkaŭ 200 buŝaj komencantaj kursoj, 10 progresintaj. Partoprenis 2,500.

b) 20 kursoj en lernejoj ekster la lerneja programo.

c) Koresponda kurso kun 650 kursanoj.

d) kurso en Varsovio gvidata de Julio Baghy el Budapeŝto. Grupa vivo. La laborprogramo de la filioj altiris tre grandan intereson de la publiko en multaj lokoj, precipe en Krakovo, kie pro la 50-jara jubileo de Esp-Societo okazis ekspozicio en la internacia klubo.

Fondiĝis nova grupo en la plej granda vagonar-fabriko "Pa-Fa-Wag" en Wroclaw.

Kongresoj. 447 personoj kaj 62 oficialaj delegitoj de la filioj partoprenis la nacian kongreson en Gdansk kaj 38 partoprenis la U.K. en Marseille.

Propagando. La gazetara servo dissendis regule informon al 100 gazetoj. 30 radio-dissendoj okazis de plej gravaj okazintaĵoj estis faritaj de Varsovio. Prelegvojaĝis S-ino Anna Alamo-Sandgren de Svedujo, kaj S-ro Hesapčiev de Bulgario. Ili prelegis al 5,000 personoj.

Oni disdonis U.E.A. foliojn al 4 diversaj neesperantaj kongresoj.

Por detaloj pri la vizito de poloj vidu la noton sub Jugoslavio.

15) **Svedujo.** Sveda Esperanto-Federacio havis je la jarfino 1.975 membrojn en 59 grupoj.

Informado estas unu el la ĉefaj taskoj de la estraro. La afiŝoj de UNO kaj UNESKO plurloke ekspoziciitaj. Krome informafiŝoj multkoloraj kaj pluraj broŝuroj senkoste je dispono de la grupoj. Ekspozicioj grandskalaj en 4 lokoj. Informado pri E kun lumbildprelego de J. Strönnen antaŭ la internacia "infanvilaĝo" en Frostavallen. S-ino Anna Alamo-Sandgren kaj s-ro Roland Dupuis pere de pluraj prelegoj informis pri E antaŭ granda nombro de aŭskultantoj.

Pluraj gazetartikoloj aperis, i.a. okaze de la 70-jara datreveno de la apero de E. En decembro Sveda Radio disaŭdigis speciale aranĝitan programon pri E.

Raportitaj 112 kursoj kun 1006 partoprenantoj. Senkosta veturo al Marseille lotumita inter ili. I.a. s-ino Marie C. Major, Britujo, kaj s-ro E. Jehart, Jugoslavio, gvidis kursojn. Krome korespondaj kursoj. Radiokurso de IBRA-radio (Tanger) sub gvido de s-ro Ernfrid Malmgren. La unua Popola Altlernejo startigis kurson en Karlskoga.

Prelegvojaĝoj de Marie C. Major, Bertram Potts kaj O. T. Nicolaisen. Pluraj membroj en Marseille. IBRA-radio sendis programon ĉiumonate. Tri novaj sekcioj (instruista, junulara kaj abstinencula) fonditaj.

Sveda Esperanto-Instituto prizorgis la ekzamenojn, kaj Eldona Societo Esperanto translokiĝis al nova ejo en Malmö. Nova lernolibro de Ernfrid Malmgren aperis.

Monkolektado por anoncado en la gazetaro kaj por la statuo de la Esperanto-Placo en Gotenburgo okazis dum la jaro. Jarkongreso en Nybro. La monata gazeto "La Espero" regule aperis per 2.500 ekz. monate. Kreskanta intereso por nia afero.

16) **Svislando.** La Svislanda Esperanto Societo havas membraron de 330 kaj viglan junularan sekcion. Du kursoj okazis en popolaltlernejo, 3 en komerc-lernejoj kaj 7 aranĝitaj de grupoj.

En Bern funkcias sur privata bazo Svisa Esperanto-Instituto. Plenumitaj taskoj; gvidado de privataj kursoj, kolektado de gazetartikoloj, administrado de koresponda kurso, turismaj informoj, gvidado de turistoj.

Forsendo de 897 gazetoj, prospektoj kaj programoj; kaj 171 leteroj aŭ kartoj.

Informa kaj propaganda laboro. Eldonado de Esperanto-informo al la gazetaro, 6 germanlingvaj al 150 gazetoj kaj 4 francalingvaj al 50 gazetoj.

Elpendigo de 100 afiŝoj en la tramoj de urbo Zurich por varbado de kurso.

Aperigo de gazetanoncoj pri koresponda kurso.

Ekspozicio en Aarau dum Svisa Esperanta Tago.

Radiosendaĵoj de radio Schwarzenburg.

Eldono de nova turista prospekto de privata fervojo.

Internacia FERIA Semajno "Esperanto kaj Geonismo"

17) **Urugvajo.** La Urugvajna Esperanto-Societo. Membraro 84; Junulara rondo Zamenhof, 30 membroj. La organo "Boletin" regule aperas, trimonate, 500 ekz. Funkciis 5 kursoj, du en oficialaj institutoj, unu en liceo.

Gazetara servo regule funkcias kun proksimume 80 publikaĵoj en la gazetaro. 3,000 ekz. de U.E.A. folio estis prestaj en hispana lingvo.

Ĉiuj instruistaj seminarioj ricevis cirkuleron pri Esperanto kaj la pli multo respondis favore. La studo "Lingvo Hispana" en la plano de tiuj seminarioj inkluzivas "Elementojn de universala lingvo: Esperanto". Tri elstaraj eventoj en la jaro estis (1). La rekomendo de Esperanto al ĉiuj profesoroj kaj instruistoj per decido de la 6a Panamerika Kongreso de Edukistoj en Montevideo; (2) la unua Argentina-Urugvajna Renkontiĝo de Esperantistoj en la urbo Colonia, Urugvajo, en kiu partoprenis 50 el ambaŭ landoj; (3) la enlaso de lektorato de Esperanto en la planita studkursaro de la prestiĝa kaj duonoficiala Instituto de Superaj Studoj.

18) **Usono.** La Esperanto Ligo por Nordameriko. Membraro, 460 aliĝintaj, 350 konstantaj. Kelkaj grupoj kunlaboras. Individuoj laboras propranciate.

La ofiala organo estas "North American Esperanto Review".

Estas koresponda kurso "Esperanto by Mail" kaj kursoj en vesperaj lernejoj kaj Y.M.C.A. Ekspozicioj okazis en la naciaj ĉefurboj dum la somero. La Ligo atingis, ke UN presigis Esperantan tekston sur diverskoloran afiŝon pri la Homrajtara Tago.

Oni konstante sendas bultenojn al la gazetaro.

II NEALIĜINTAJ ASOCIOJ

1) **Ĉinujo.** La Ĉina Esperanto Ligo ricevas subvencion de neesperantistaj instancoj, Membraro 297 kun 9 lokaj grupoj.

La gazeto "El Popola Ĉinio" dumonate aperas kaj "Bulteno" en la ĉina lingvo estis eldonita.

La Ligo aranĝis 5 kursojn kaj 3 estis loke organizitaj kun entute 300 partoprenantoj.

Estas lektoro de Esperanto en la Ĉina Popola Universitato en Pekino.

10 artikoloj kaj dudek informoj, ĉiuj favoraj, aperis en naciaj gazetoj.

La Ligo sendis delegiton al la junulara festivalo en Moskvo kaj akceptis pli ol 22 gastojn el 9 landoj. Ĝi faris radiodissendon al SudAmerikaj kaj Vietnamaj esperantistoj.

2) **Hungarlando.** La Hungarlanda Esperanto Konsilantaro ricevis gravan ŝtatan apogon dum la jaro pro la provizo ŝtata de ejo en la centro de la ĉefurbo kaj de konsiderinda subvencio de la popolkleriga ministerio.

HEK havas 600 membrojn, kaj 44 rondoĵ funkcias. La junulara fako havas 32 rondoĵojn en diversipaj pedagogiaj instancoj kaj lernejoj. 977 personoj partoprenis en 40 kursoj.

HEK eldonis 4 seriojn de ilustritaj poŝtkartoj en 15,000 ekz. kaj bildkartojn kaj glumarkojn.

60 artikoloj aperis en 16 gazetoj kaj 124 informoj. En

41 eksterlandaj gazetoj aperis 70 sciigoj rilate al la Hungara movado.

La "Bulteno" monate aperas en 5,300 ekz. kaj okazis 7 ekzpozicioj vizititaj de 6,000.

La radio donas informojn pri gravaj okazoj.

630 partoprenis regionajn renkontiĝojn kaj 80 junularaj delegitoj partoprenis apartan renkontiĝon.

La fervojista fako amase kunigas fervojistojn kaj edukas la junularon.

La serio de esperanto-poŝtmarkoj multe helpis la movadon.

Grave evoluis la hungarlanda esperanto-movado malgraŭ la politika, socia kaj ekonomia malfacilaĵoj.

3) **Rumanujo.** La Iniciata Komitato por Esperanto komencis funkcii kaj gvidas la movadon ĝis estiĝo de asocio. Ĝi havas salajratan oficiston.

La komitato instigis la formadon de lokaj komitatoj kaj grupoj en 30 urboj kiuj funkcias ĉe kulturaj domoj, entreprenaj, lernejoj, universitatoj kaj aliaj klubejoj. Ĝi helpis restarigi blindulmovadon en 7 urboj kiuj eldonis 100 ekz. de "Fundamento de Esperanto" brajle.

70 publikaj kursoj kun pli ol 2,000 kursanoj estis aranĝitaj laŭ klasika kaj rekta metodoj. Oni eldonis malgrandan gramatikon kaj vortaron en 500 ekz por helpi kursanojn.

La duonmonata revuo "REBUS" publikigis 10-lecionan kurson.

Oni kontraktis kun la ŝtataj eldonejoj presigi lernolibron kaj du vortarojn.

La Societo por Scienca kaj Kultura Disvastigo okazigis prelegvojaĝon en 10 gravaj urboj kun la titolo "Esperanto, lingvo internacia", kaj okazis aliaj prelegoj kaj ekspozicioj.

La Instituto por Lingvo-Scienco, kaj la Akademio de la Rumana Popola Respubliko — fako de lingvo-scienco kaj literaturo — skribe rekonis la utilecon de Esperanto kaj aprobas la movadon. Komisio por kapablecatesto de tradukistoj funkcianta en la kadro de la Instituto por

Lingvo-Scienco, akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon.

Radio-Bukureŝti disaŭdigis informojn kaj faris du specialajn elsendojn, unu titolita "Malnova kaj Nova Pasio; Lingvo Esperanto".

Je la Zamenhofa Festo parolis rumanlingve universitata profesoro Grigore Moisil al pli ol 600 personoj.

4) **Sarlando.** La Sarlanda Esperanta Asocio. Membraro 100, grupoj 5, kursoj 6.

Preskaŭ 2,000 flugfoliojn estis disdonitaj kaj pli ol 2,000 gvidfoliojn pri la urbo Saarbrücken.

La Asocio aranĝis du prelegojn por la Tago de U.N. kaj la Tago de Homaj Rajtoj.

III FAKAJ KAJ NENEŬTRALAJ ORGANIZAJOJ

1) **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.** La raporto montras multflankan kaj tre aktivan laboron. La Ligo funkcias per membro-asocioj kaj reprezentantoj en diversaj landoj.

La oficiala organo estas "Instruista Letero".

Membraro: 9 membroj-asocioj (sekcioj), Aŭstralio (12), Aŭstrujo (30), Britujo (191), Finnlando (40), Francujo (836), Germanujo (146), Italujo (135), Japanujo (eble 100), Svedujo (40), Entute 1430.

Nova sekcio formiĝis en Nederlando.

Krome, reprezentantoj en Algerio, Belgujo, Bulgarujo, Danlando, Hispanujo, Irlando, Izraelo, Jugoslavio, Maroko, Norvegujo, Polujo, Portugalujo, Svislando, Urugvajo, Usono.

Entute la Asocio havas statistikon pri minimume 1803 geinstruistoj en 30 landoj. Esperanto estas instruata en minimume 88 lernejoj en 9 landoj.

La plej forta situacio tiurilate estas en Britujo kaj Jugoslavio.

Koresponda Servo por lernejoj kaj lernejoj instruistoj funkcias ĉe la Centra Oficejo de I.L.E.I. Partoprenado ĉe blinduloj nun komenciĝas.

La vortaro por lernejoj, Anglalingva-Esperanta, eldonita de la brita instruista asocio, S.B.E.T. estas multe uzata, kaj laŭ peto sendita al Usono, Japanujo kaj al Hungarujo (por kontroli vortuzadon en lernolibro angla-lingva). La ekzameno por lernejoj de la B.E.A. preparita de

S.B.E.T. ano kreskas.

Dum la U.K. en Marseille okazis aferkunveno kaj publika kunveno pri la temo "Kiuj estas la limoj de la profesiaj devoj de instruistoj"?

Informiloj: Aŭstralio, Aŭstrujo, Britujo, Francujo, Germanujo (ankaŭ lando Hessen) Nederlando havas proprajn organojn, plejmulte multobligitajn, treege helpemajn al solidareco kaj aktiveco.

La franca organo "Esperanto et Culture" enhavis sekcion "Internacia Pedagogia Revuo" (nun aparte eldonita) kun artikoloj pri ĉiuspecaj edukaj aferoj kaj informoj internaciaj. La nuna "Internacia Pedagogia Revuo" aperas 6-foje dum la jaro.

La Ligo havas neoficialajn terrilatojn kun UNESKO kaj ricevas dokumentojn kaj raportojn. Ni daŭre dissendas la simpligitan "Deklaracion de Homrajtoj" por lernejoj.

Ni ricevas raportojn de la Mondkongfederacio de la Organizaĵoj de la Instruista Profesio, kaj sendis salutojn al ties konferenco kaj prizorgis la disdonadon de informfolioj de U.E.A. al la delegitoj.

Nia reprezentanto en Pollando, Prof. Toczyski, salutis la Mondkongreson de Instruistaj Asocioj en Varsovio, Aŭgusto, 1957, kiel observanto invitita, kaj disdonis foliojn de U.E.A. al ĉiuj delegitoj.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. La membraro restas konstanta je 1,200 en 14 landaj grupoj.

La sacerdota sekcio nombras preskaŭ 300. La ilustrita monata revuo "Espero Katolika", fondita en 1903, aperas regule en 1,250 ekz.

Internacia Sciencia Asocio Esperantista. Membraro 440 kun 5 landaj filioj kaj delegitoj en 13 aliaj landoj. Jam ekzistas terminologia sekcio, kaj estis fonditaj, en 1957, Traduka Servo, kaj Centro por Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj (CIKI).

La Traduka Servo celas helpi al ĉiuj interesigantaj scienculoj akiri pere de esperanto bezonajn sciencajn artikolojn aperigitajn en lingvo nekonata al ili. La Asocio starigis kontakton kun scienculoj en orientaj landoj kaj solvis la problemon sendi al ili la oficialan organon.

La kvaronjara organo "Sciencia Revuo" aperadis tre neregle sed oni esperas reguligi tion.

La jarkunveno de ISAE en Marseille decidis reorganizi la Asocion tiel ke ĝi konsistu el individuaj membroj kaj el fakaj sekcioj, inter kiuj estos ankaŭ memstaraj fakaj asocioj. La Asocio planas starigi studentan sekcion kun malpli alta kotizo.

Dum la U.K. en Marseille, la Komitato de U.E.A. akceptis ISAE kiel la unuan fakan organizaĵon aligintan al U.E.A.

Internacia Verkista Asocio. La Asocio estis fondita dum la 42a U.K. en Marseille. Ĝiaj celoj estas: doni firman bazon por solidareco kaj komuna laborado inter ĉiuj verkistoj de la internacia lingvo Esperanto: reprezenti la verkistojn en ĉiuj rilatoj kun la Esperanto-movado, kiuj koncernas ilin kiel verkistojn kaj gardi la interesojn de la membroj rilate aŭtorajn rajtojn, honorariojn kaj tradukojn, ankaŭ rilate neesperantistajn eldonejojn; starigi kaj firmigi la bonan reputacion de la esperanta literaturo en ĉiuj rondoj neesperantistaj.

Unuaj paŝoj al realigo de tiuj celoj estas jam faritaj en diversaj okazoj. I.V.A. havas 40 anojn el 19 landoj.

Kristana Esperantista Ligo Internacia. La Ligo daŭrigis siajn klopodojn enpenetri en la rondojn de la ekumenaj movadoj kaj interŝanĝas novaĵojn kun la ekumena centro de Genevo.

La Ligo sendas esperantan literaturon, vestaĵojn k.t.p. precipe al orienteŭropaj esperantistoj.

La organo "Dia Regno" regule aperas.

Antaŭ la U.K., la Ligo kongresis en Münchenwiler, Svislando kie partoprenis 80. La tiea jarkunveno decidis fondi kason por eldoni konkordancon de la esperanta Biblio, kaj konkordancon de ĉiuj Zamenhofaj verkoj.

En Marseille La Ligo prizorgis la Protestantan diservon.

La Ligo kore kunlaboras kun U.E.A.

Kvakera Esperantista Societo, reordigis post kelkaj jaroj, dum mankis sekretario.

Oni esperas pli evoluigi la Societon per regionaj kontaktoj antaŭtaŭ per Vicprezidantoj.

La gazeto "La Kvakera Esperantisto" aperas kvaronjare.

La Skolta Esperantista Ligo. La elstara okazaĵo por la Ligo estis la kunveno de membroj kaj subtenantoj ĉe la

Jubilea Jamboreo en Anglujo. 30 personoj el 7 landoj ĉeestis. Oni diskutis la laboron de la Ligo kaj ĝian gazeton "La Skolta Mondo".

Raportoj de Belgujo, Danlando, Britujo, Finnlando, Aŭstralio kaj Usono montris viglan aktivecon en Skoltaj medioj, kaj la Ligo sukcesis vekti intereson je la Direktoro de Internacia Skolta Oficejo kies gazeto "World Scouting" (Monda Skoltado) portis artikolon en angla kaj franca lingvoj.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. La nova junulara sekcio de U.E.A. komencas marŝi; ĝin ankoraŭ provizore gvidas la komisiono tiucele elektita en la Kopenhaga Kongreso, sub la prezido de S-ro G. Becker, Gasthaus Burgerhof, Eisenbahnstr. 60, Homburg/Saar, Germanujo; la administrejo estas ĉe la Ĝenerala Sekretario, S-ro N. Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italujo.

Kvankam ne ĉiuj landaj asocioj konsciis pri la neceso energie apogi la junularan movadon per kreo de junularaj sekcioj, la sekcioj nun ekzistantaj vikle laboras. Ekzistas landaj sekcioj de TEJO en Bulgarujo, Germanujo, Italujo, Svisujo, kaj Urugvajo, Fondiĝas sekcioj en Francujo, Nederlando kaj Svedujo. Estas kunlaborantaj sekcioj en Ĉeĥoslovakujo, Hungarlando kaj Britujo.

La ĉefaj manifestacioj aranĝitaj aŭ helpitaj de TEJO dum la pasinta jaro estas; la 13a Internacia Junular-Kunveno en Villeneuve-les-Avignon, proksimume 30 partoprenis; la renkontiĝo de la esperantistoj dum la 6a Festivalo de la Junularo en Moskvo, proksimume 250 partoprenis; la 3-aj TEJO-Skiferioj en Tauplitz, proksimume 10 partoprenis; la Skisemajno de Esperanto-Junularo de Svislando en Adelboden, proksimume 20 partoprenis; kaj la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Majenco kun 50 partoprenintoj.

Universala Ligo havas 11,930 membrojn, kaj reprezentantojn en 33 landoj.

La jarkunveno de la Ligo okazis en la kadro de la 10a Internacia Kongreso de la Mondmovado de Mond-federalistoj. Post la jarkunveno parolis S-ro Mag.

S. Pragano pri "La instruado de historio en diversaj landoj".

Regule aperas la organo "La Praktiko" grandformata, bele ilustrita gazeto de internacia intereso.

La kuponoj, "steloj", ankoraŭ tre utilas al la esperanto-movado kiel internacia pagilo.

De aliaj landaj aŭ specialigitaj organizaĵoj raportoj ne estas ricevitaj.

Pro malsano de la estrarano pri landaj kaj specialigitaj organizaĵoj, la Aldonon kompilis:

H. W. Holmes O.B.E.

Vic-prezidanto.

REZOLUCIO

La Federacia Estraro de Germana Esperanto-Junularo (G.E.J.) konstatas kun granda ĝojo, ke en la jaro de la Universala Kongreso en Mainz la 50-jara Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.) prezentas sin pli granda, pli aktiva kaj kun pli larĝaj estontaj perspektivoj ol iam antaŭe.

La Federacia Estraro de G.E.J. esprimas al U.E.A. en tiu jubilea okazo siajn komplimentajn sentojn kaj direktas al ĝiaj Prezidanto, Ĝenerala Sekretario, Estraro, Komitato kaj al ĉiuj ĝiaj organoj plej sincerajn gratulojn pro la bonharmonia kaj plensukcesa aktiveco plenumita en la lastaj jaroj.

Tute speciale la Federacia Estraro de G.E.J. konsideras kun admiro la tre vastan laboron faratan kun plena sindediĉo de Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj — okaze de la nuna 30-jara datreveno de lia esperantistiĝo — sendas al li esprimojn de kora danko, simpatio kaj solidareco.

La Federacia Estraro de G.E.J. samtempe publike kondamnas la sterilajn kaj malhonestajn klopodojn, semi malpacon en la Esperanto-Movado per senĉesaj atakoj, denuncoj kaj kalumnioj kun politika karaktero kontraŭ fidelaj batalantoj por Esperanto.

Por la Federacia Estraro de G.E.J.

Richard Reuchlin Günther Becker

1-a Prezidanto 2-a Prezidanto

Komitataranoj de U.E.A.

Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

Fondita 30-3 1942

Antaŭ ol veni Rio-n anoncu vin al : Poŝtkesto 3677

Kulturkunveno ĉiusabate je la 16a h.

Sidejo : Praça Pio X, 78- 7a etaĝo ĉambroj 714/16

Malfermita ĉiutage de la 9a ĝis la 20a

Oficiala organo : RIO ESPERANTISTA

En Jarlibro 1959, Unua Parto aperos

Listo de Esperanto-Kluboj

kun horoj kaj tagoj de kunvenoj

Kostoj por unu mencio :

1,25 gid.; 5 steloj; unu dekono de kotizo-MA en

propra valuto

Sendu tuj viajn informojn al la Centra Oficejo !

GASTRONOMIA TERMINARO

KUN

FAKTERMINARO
POR KELNEROJ KAJ KUIRISTOJ

DE

ERHARD URBAN

ELDONIS U.E.A. — JARLIBRO 1958 DUA PARTO



Ĉar mi la ortografiojn de la lingvoj angla kaj franca ne scipovas nepre perfekte, mi petis la ges-anojn Ernest A. Allsop, Baldock, (Herts) kaj ankoraŭ unu personon kiu ne deziras estis citata, Anglujo, Reto Rossetti, Birminghamo, Skotlando, D-ron P. Neergaard, Kopenhago, Danlando, (frukto, legomo, spico) kaj kunlaborantinon en Francujo, ke ili la erarojn de la naciaj lingvoj kaj eventuale ankaŭ de Esperanto, korektu. La nomataj ges-anoj tion kompleze faris kaj tial mi ĉi tie esprimas al ili mian tutkoran dankon. Mi estas certa, ke la kompilaĵo estos al ĉiuj ges-anoj tre utila.

Erhard Urban,

Vlastějovice 47. Bohemio, Ĉ.S.R.

CAPRI

la plej bela insulo en la mondo

HOTEL BIANCAMARIA

la plej moderna hotelo sur la insulo

Jus konstruita — kun komforto moderna, akvo varma kaj malvarma, ŝprucbanoj, k.t.p. — ĉi tiu hotelo estas la idealaĵo por via luksema vizito al CAPRI... kaj per moderaj prezoj. La blua Mezmario kuŝas ekstere de via fenestro. La seĝo-lifto al montsupro de Monte Solaro estas apud via pordo. La Groto Blua, Palaco de Imperiestro Tiberio — ankaŭ apude.

Via G. Orlandi 30, Anacapri telefono - 1891



HOTELO HELVETIA AARAU

Proksima de la stacidomo Trankvila situo

La hejmecca, senalkohola gastejo kun

bongustaj manĝaĵoj

Favoraj prezoj

Nenia trinkmono

EN BONA HOTELO DUM AGRABLA FERIO

TRANKVILE RIPOZANTA POST STREĈA

LABORJARO

ONI ĈIAM ESTU KUN

BONA LEGAĴO

do :

La eldonaĵoj de U.E.A.!



LA REVUO ESPERANTO

BELARTO

ANGLA ANTOLOGIO

VAGADO SUB PALMOJ



Mendu ilin ĉe U.E.A.!

CIGAROJ

"HOLLANDEZES"



Postfako 30
BAHIA-BRAZILU

MONDFAMA J

ENGLISH ESPERANTO ALPHABET

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J K L M N O P R
S S T U Ŭ V Z

All the letters are pronounced as in the English language with the exception of the following :

ESPERANTO - ENGLISH		ESPERANTO - ENGLISH	
A	A .. Father	J	Y .. Yes
C	TS .. Tsar, father	J	S .. Pleasure
Ĉ	CH .. Church	O	O .. For
E	E .. There	S	S .. See
G	G .. Go	Ŝ	SH .. Shall
Ĝ	G .. George	U	U .. Rule
Ĥ	CH .. Loch	AŬ ..	OW .. Power
I	I .. Police		

The letters ŭ (corresponding to the English w) and j are consonants, aŭ, eŭ, aj, ej, oj, and uj are therefore monosyllables. Every word is to be read as it is written. The accent always falls on the last syllable but one : vojo, kantado, interparolo.



Česky : Abeceda řeči Esperanto :

